AVENO #48 - **Homaj Rajtoj kaj Respondecoj – 2022**

Ghenerala rimarko: pluraj informoj alvenas kun peticio - kompreneble plej multaj el ili ne plu estas aktivaj. Do, bonvolu kontroli la daton, se vi intencas subskribi ian ajn peticion.

Se vi serchas ion chi-sube: kutime mi uzas la literumadon pere de „h“: ch, … sh + u.
Ligoj:

**Asocio de Verduloj Esperantistaj** (AVE): www.verduloj.org , novaj artikoloj je la enirpagho, aliaj sub "Dokumentoj“

Homaj Rajtoj (1947): eo.wikipedia.org/wiki/Universala_Deklaracio_de_Homaj_Rajtoj

Lingvaj Rajtoj = Homaj Rajtoj: www.linguistic-rights.org/

Tutmondaj Mondcivitanaj Teritorioj: www.recim.org/dem/tcm-list.htm

Rajto de memdetermino: eo.wikipedia.org/wiki/Rajto_de_memdetermino

Homaj Respondecoj (1997):
eo.wikipedia.org/wiki/Universala_Deklaracio_de_Homaj_Respondecoj

la dokumento en la angla, kiu ligas al tradukoj en ch. 40 lingvoj:

www.interactioncouncil.org/publications/universal-declaration-human-responsibilities

= = =

2023-01-03 La Baltiaj ŝtatoj kaj Rusio

Raporto pri la evoluo dum la lastaj 40 jaroj

Kaj pri Kaliningrada Regiono - kiun oni transdonis 1946 al la SU.

https://www.arte.tv/de/videos/106708-000-A/panik-vor-putin/

= =

2022 Vojaĝo: glacio-strato de Jakutsk al esplorstacio proksime de Tiksi je la Galacia Maro

Montras la malfacilecon transporti materialon en la plej altan nordon en orienta Siberio. Sur la insulo Samoylov en la delto de Lena troviĝas internacia esplorstacio kie oni esploras la efikojn de klimata ŝanĝiĝo.

Per aparta kamiono tio eblas nur dum la vintro kiam la grundo estas sufiĉe frostigita, aŭ eblas super la riveroj. Eĉ eblas veturi tien per biciklo - ili renkontis tian kuraĝulon. Dum somero nur eblas veturi per ŝipo. Dum 4 monatoj ne eblas (krom aviadilo aŭ helikoptero). Ĝis nun mankas sufiĉe solidaj kaj larĝaj stratoj.

https://www.youtube.com/watch?v=S7VcirrE2xc

Jen ligilo (en germana kaj angla) al la esplor-stacio Samoylov de instituto Alfred Wegener:

www.awi.de/forschung/geowissenschaften/permafrostforschung/stationen/samoylov.html

\- -

2023-02-17/19 Munkena Konferenco pri Sekureco, MKS - kiel fini la militon de Putin ?

1963 invitis E-H von Kleist-Schmenzin, germana resisto-batalanto kontraŭ Hitler, al internacia renkontiĝo de politikistoj, diplomatoj, sciencistoj kaj respondeculoj de grandaj firmaoj por eviti militojn. El tio disvolviĝis - la nuna preskaŭ ĉiujara MKS kiu estas malferma* internacia konferenco kvazaŭ granda Ronda Tablo por diskuti la internaciajn konfliktojn. Kutime ĝi okazas komence de Februaro. De 2008 - 2022 gvidata de diplomato Wolfgang Ischinger.

Mi ĵus aŭdis intervjuon de DLF kun  eksa ambasadoro Christoph Heusgen , nun organizanto de ĉi-tiu internacia konferenco kiu montris la gravajn elirpunktojn por fini la militon de Putin kaj Lawrow kontraŭ Ukrajno:

La solaj progresoj estis la ebleco transporti grenon de Ukrajno al  eksterlando, kaj la interŝanĝo de kaptitaj soldatoj.

La postuloj de UA egalas al internacia juro. Ne temas al konflikto inter Oriento kaj Okcidento, sed tute ĝenerale estas mistrakto de internaciaj reguloj flanke de Rusio.

Nun ne eblas diskuti pri paco, ĉar unuflanke Ukrajno volas rehavi siajn teritoriojn, laŭ stato de 2013. Aliflanke Rusio volas havi tutan Ukrajnon kaj demobilizacion de Ukrajno.

Li kaj aliaj politikistoj atendas ŝanĝon de la pinto-politikistoj en Rusio por fini la militon sen tiuj personoj kiuj komencis ĝin. Oni vidas ke eĉ liaj internaciaj amikoj distanciĝas de la milito de Putin.

1992 - 1994 Lawrow estis vic-ministro pri eksteraj rilatoj kaj poste daŭra reprezentanto de Rusio en la Sekureco-Konsilio de UN.

1994 Lawrow postulis transdonon de atomarmiloj de Ukrajno al Rusio kiuj post la disfalo de Sovetunio restis en Ukrajno.

1994  Ukrajno - kune kun la internacia mondo - fidis al Lawrow, ke la mondo estus pli sekure, se Ukrajno fordonos la restintajn atomarmilojn al Rusio, kaj Lawrow subskribis la Budapeŝtan Memorandon, kiel dokumento de la UN Sekureco Konsilio, kaj tie Rusio garantiis la Sekurecon kaj Sendependecon de Ukrajno.

Ĉar la sama Lawrow nun 100%e subtenas la militon de Putin, li ne povos sidi je ebla Ronda Tablo, kaj ankaŭ ne Putin mem. Ili falsinformas la rusan popolon pri brutalaj agadoj de Ukrajnoj, subpremas opoziciulojn kaj alvokas ke por savi la altajn rusajn moralajn valorojn necesas neniigi Ukrajnon.

La justa loko por ili - kaj por kelkaj aliaj - estas la Internacia Juĝkortumo en Den Haag.

*) malferma - ne tute malferma: oni ne invitas politikistojn kiuj delonge montris ke ili nur false rakontas sia-flanke, kaj ne pretas aŭskulti kaj pripensi la vidpunktojn de aliaj.

Denove pri MKS:

2007 Putin parolis tie, kaj plendis kontraŭ la Okcidento. Sekve de tio en la jaro

2008 Germanio sekvis liajn petojn kaj je pintokonferenco de NATO ne akceptis ala aliĝon de Kartvelio kaj Ukrajno ! Evidente tio estis eraro.

2013 temis pri Sirio, partoprenis la rusa ministro pri eksteraj aferoj Sergej Lawrow, kaj li havis disputon kun la usona vic-prezidento Biden, kiu kritikis, ke Rusio subtenas la diktatoron Assad.

2014 Je MSK temis pri Euromaidan en Kievo ĉar la registaro sub prezidento Janukovych batalis kontraŭ la opozicio. Li estis eksoficigita je la 22a de Februaro, ĉar li ne subskribis la kontrakton kun EU. Lawrow riproĉis la Okcidenton organizi revolton.

Laŭ la konferencoj de Minsk necesus diskuti, sed Putin preferis rabi rapide Ukrajnon - kio evidente ne sukcesis, dank' al la kuraĝaj homoj tie, kaj finfine ankaŭ dank' al internacia helpo por Ukrajno. Jen ligiloj pri MKS - ankoraŭ ne en Esperanto, sed en multaj aliaj lingvoj, inkluzive la rusan:

https://de.wikipedia.org/wiki/M%C3%BCnchner_Sicherheitskonferenz

Jen pri la menciita intervjuo (13:25 minutoj):

https://www.deutschlandfunk.de/leiter-der-muenchner-sicherheitskonferenz-fordert-mehr-druck-auf-russland-102.html

https://www.deutschlandfunk.de/friedenskonferenz-fuer-ukraine-interview-christoph-heusgen-msc-leiter-dlf-806d1172-100.html

Jen la Budapesta Memorando - lingvoj: en, ru, ua - subskribita de la prezidentoj de Ukrajno - Leonid Kuĉma, de Rusio - Boris Jelcin, de UK - John Major, Usono - Bill Clinton:

treaties.un.org/doc/Publication/UNTS/Volume%203007/Part/volume-3007-I-52241.pdf

Pri la Minskaj Konvencioj - kiuj ne havis ŝancon, ĉar la rusaj milicoj ne finis okupi la terenon - en pluraj lingvoj, sed ne en Esperanto:

https://de.wikipedia.org/wiki/Minsk_II

- - -

2022-11-22 prelego pri la dek-jara evoluo al milito de Putin kontraŭ Ukrajno

Jen interesa prelego de politike elstara profesoro Michael McFaul de la universitato Standford, usona ambasadoro en Rusio inter 2012 - 2014. Li montras la evoluon de Putin, kaj la fonoj malantaŭ ĉi-tiu milito - 39 min en la angla (subtitolita, sed ne perfekte; mi reduktis la rapidecon por kapti la prelegon pli bone):

https://www.youtube.com/watch?v=Wbzf0ix2G5I

- -

2022-07 Intervjuoj en Estonio

50 minutoj en la germana, de sviso Christoph Franzen ( por SRF).

Enhavas mallongan videon pri la „Balta Vojo“ - Augusto 1989 - kiam 2 milionoj da homoj faris homan ĉenon trans la 3 baltaj landoj. La estonoj vidas ke NATO estas asekuro kontraŭ denova okupacio fare de Rusio (malnostalgia rememoro al Sovetunio).

Iu virino komentis, ke la svisa neŭtraleco (ne liveri armilojn al Ukrajno, rekte aŭ pere de aliaj landoj) ne estas akceptebla, ĉar Ukrajno estis atakita de Rusio kaj nur defendas sin mem.

https://www.youtube.com/watch?v=ab7y75K1wPI

= =

2022-12-21 Ankoraŭ milito de Rusio kontraŭ Ukrajno

Laŭ okcidentaj informoj jam mortis preskaŭ 100.000 rusaj soldatoj.

https://www.fr.de/politik/verluste-ukraine-krieg-russland-panzer-drohnen-ukraine-osten-soldaten-opfer-news-ticker-zr-91983775.html

Putin hodiaŭ decidis denove ampleksigi la armeon je 350.000 ĝis 1,5 milionoj da soldatoj - li argumentis ke tio okazis pro la nova situacio rilate la nordaj najbaroj Finnlando kaj Svedio, kiuj rezignis pri sia neŭtraleco. Eble simple necesas replenigi la truojn ?

https://www.tagesschau.de/ausland/europa/ukraine-putin-rede-101.html

Jen konciza raporto (12 minutoj) pri la diversaj opinioj de homoj en Kaliningrado, la urbo de Immanuel Kant kaj de Johann Gottfried Herder.

https://www.arte.tv/de/videos/109058-000-A/russland-kaliningrad-die-exklave-von-putin/

Jen informo pri tiu instituto, plejparte ankaŭ en la angla:

https://de.wikipedia.org/wiki/Herder-Institut_(Marburg)

Jen listo de eblecoj subteni ukrajnajn sciencistojn aŭ NRO-ojn:

https://www.herder-institut.de/event/unterstuetzungsmoeglichkeiten-fuer-ukrainische-wissenschaftlerinnen/

- -

2022-12   Milito kontraŭ falsaj informoj

Iam mi montris paĝon de vikipedio pri falsaj informoj (Fake News) de la rusa propagando. Jen serio da koncizaj dokumentaj filmoj de ĵurnalistino de la ekzil-rusa televido Doĵd (pluvo).

https://www.arte.tv/de/videos/RC-022858/fake-news/

Germanio el vidpunkto de rusia propagando:

https://www.arte.tv/de/videos/109809-005-A/fake-news/

inter pluraj aliaj:

https://www.arte.tv/de/videos/109809-001-A/fake-news/

kaj pri NATO:

https://www.arte.tv/de/videos/109809-007-A/fake-news/

= =

Kaj jen informoj pri la milito - de M23 - en orienta D.R.Kongo, kie la UN misio MONUSCO ne sukcesas zorgi por paco:

hieraŭ mi aŭdis/vidis prelegon de Gabriele Krone-Schmalz (dum multaj jaroj ĵurnalistino de germana TV en Rusio), kiu ĉefe rakontis pri la tre diversaj kaŭzoj kiuj instigis la rusan prezidenton al lia celo neniigi Ukrajnon. Unue ĉar volas rehavi Sovetunion, kaj lia timo ke NATO minacas Rusion. Malgraŭ ĉi-tiuj kaŭzoj/instigoj ŝi klare kondamnis tiun militon.

La sola minaco estas ke la pozitivaj resultoj de okcidento povus delogi la naciojn en Rusa Federacio.

Laŭ mia kompreno estis libervola afero, kiu lando volas aliĝi al NATO aŭ EU pro demokratio kaj  liberaliso.

Putin sukcesis ligi Ĉeĉenion al Rusio, dank' al la vasalo Kadyrev. Same kiel la baltiaj landoj ankaŭ la kaŭkazaj volis sendependecon. Ĉeĉenoj kiujn mi renkontas kelkfoje je nia manifestacio antaŭ la Ĝenerala Konsulejo de Rusio (la nomo sur ilia poŝtkesto: "Botschaft der UdSSR" - amabsadejo de SU) plendas ofte ke ili ne ricevis tiom da subteno el la okcidento kiam Putin detruigis ilian ĉefurbon Grosny. Ĉiukaze ili deziras sukceson al Ukrajno.

Ukrajno aliĝis al Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj, sed forlasis ĝin 2014 post la anekso de Krimeo flanke de Rusio (bona raporto pri tio en la libro de Kalle Kniivilä).

Se Rusio restus je la linio, oferti sendependiĝon de ĉiuj nacioj en Rusio kaj libervolan kunlaboron ene de tiu KSŜ, simile kiel en Eŭropa Unio; tio estus bona alternativo al tiu nuna diktaturo de Moskvo super diversaj nacioj en RF (nacio difinas sin kutime pere de propra lingvo).

Mi esperas ke baldaŭ la milito estas haltigita, kaj ke oni kunsidas por trovi daŭripovan solvon. Teorie eblas diskuti pri solvo dum la milito daŭras.

= = =

2022-12  Korupcio en la EP - lobiado de MEPino

Se vi loĝas en EU, tiam vi certe aŭdis pri la aktuala okazaĵo, ke membro de EP akceptis multe da mono por subteni la deziron de la registaro de Katar (?), ke iliaj civitanoj ne bezonu vizon por viziti la Schengen-landojn en Eŭropo. MEP ja ricevas tre altan kvazaŭ-salajron por ke ili ne bezonas ĉerpi monon de iu alia laboro. Kompreneble oni atendas, ke

ili ne vendas sian voĉon al iu interesulo. Bedaŭrinde tio ĵus estis trovita.

Jen en la germana, vi certe trovas ankaŭ en aliaj lingvoj:

https://www.tagesschau.de/ausland/europa/kaili-eu-bruessel-107.html

- - -

2022-12  Senperforta Komunikado - ĉu utila pri Rusio & Ukrajno ?

Jen detala vikipedio, kun pluraj ligiloj (dankon al Janek):

https://eo.wikipedia.org/wiki/Senperforta_komunikado

2022-12 / 2023-07-29  Kiel atingi pacon ?

La libreto de Immanuel Kant „Zum ewigen Frieden“ montras kelkajn tre logikajn principojn por eviti militon.

Jen prezento de bazaj kondiĉoj por atingi pacon, aŭ - pli bone - eviti militon:

Demokratio estas bona bazo, ĉar demokratioj kutime preferas diskuti siajn problemojn.

https://www.arte.tv/de/videos/104841-005-A/wie-werden-wir-kriege-los/

- - -

Raporto de Jackson el la regiono Kivu, DR Kongo:

M23 estas movado de la 23a de marto 2009 ,

En Rutshuru la vivo daùre malfacilas pro la pli kaj plis malboniganta

invada milito far la ribeluloj M23 ekde februaro.

La 29an de oktobro , mia urbeto Kiwanja kaj Rutshuru centro fiais en la manojn de M23 ,

mi restis enfermitaj en la domo dum la tuta tago .

Krom timego malsato estas granda io kiu antaù kostis 1$ nuntempe

kostis 2 aù 3$, la laboroj mankas, lernejoj ne funkcias, vojoj al

aliaj urboj kaj regionoj estas blokitaj .

- -

Laù alia analizo ĝi estas movado por balkanizi Kongon .

Ĝi suferigas ne nur Kiwanja sed intencas preni kiel eble plej grandan teritorion de orienta kongo, la logxantaro estas viktimoj de tiu politika milito: mortigoj, malsato  ĉiutaga fuĝado ... Ili estas proksime de Goma nun. Terura krizo frapis cxiujn nin.

Amike Jackson

- -

2022-08-05  ĝis 2023-07-29  Ukrajna Libereco Orĥestro fondiĝis kaj ludis en Varsovio

Ĝi konsistas el rifuĝintoj kaj ukrajnaj membroj kiuj jam ludas en eŭropaj orĥestroj.

La iniciativo - laŭ ideo de ukrain-kanada dirigistino Keri-Lynn Wilson - estis de Metropolitan Opera kaj Pola Nacia Opero. Ili prezentas: Valentin Silvestrov 7a simfonio; Frederic Chopin piano-koncerto No. 2, Johannes Brahms 4a simfonio; krome de Ludwig van Beethoven el Fidelio la ario de Leonore „Fiulo ! Kien vi fuĝas?“

Pianistino estas Anna Fedorova, Sopranon kantas Liudmiyla Monastyrska.

Videbla: https://www.arte.tv/de/videos/110058-000-A/ukrainian-freedom-orchestra/

= =

2022-11-20  Bazo de korupcio - monlavado

unu el la manieroj kaŝi „malpuran“ monon estas aĉeti valoraĵojn, ekzemple konstruaĵojn. En kazo de suspekto oni ne plu povas trovi pruvon, de kie venis la mono. Jam ekzistas registro pri firmaoj kiuj posedas akciojn. Finfine Germanio faris plian paŝon kontraŭ monlavado. Nova leĝo malpermesas pagi fakturon pli alta  ol 10 mil Euro pere de kontanta* mono, do monobiletoj. Pliaj paŝo venus - kaze de suspekto. Malebligi monlavadon aŭ malhonoran riĉiĝon estas la celo de civitana organizo „Finanzwende“: https://www.finanzwende.de/

Ekzistas tutmonda organizaĵo kiu agas kontraŭ monlavado: „Financial Action Task Force“.

Jen informo laŭ ilia retejo (traduko subtenita de traduku.net ) - retejo en la angla kaj franca:

https://www.fatf-gafi.org/

La Financa Agado Laborgrupo („Financial Action Task Force“  FATF) estas tutmonda kontrolorganizaĵo kontraŭ  monlavado kaj financado de teroristoj. La inter-registara korporacio prezentas internaciajn normojn kiuj celas malhelpi ĉi-tiajn kontraŭleĝajn agadojn kaj la malutilon kion tiuj kaŭzas al la socio. Kiel politikofarada korporacio FATF klopodas generi la necesan politikan volon estigi naciajn leĝdonajn kaj reguligajn reformojn ĉi-rilate. Ili kunlaboras kun pli ol 200 landoj kaj jurisdikcioj kiuj devontiĝis plenumi ilin. FATF evoluis la FATF-Rekomendojn aŭ FATF Normojn, kiuj certigas kunordigitan tutmondan respondon por malhelpi mafiismon, korupton kaj terorismon. Ili helpas al aŭtoritatuloj sekvi la monon de krimuloj agantaj pri kontraŭleĝaj drogoj, homo-vendado kaj aliaj krimoj. FATF ankaŭ klopodas haltigi financadon por amasdetruiloj. FATF raportas pri financaj teknikoj pri monlavado kaj teroristoj, kaj kontinue plifortigas siajn normojn trakti novajn riskojn, ekzemple la reguligo de virtualaj havaĵoj, kiuj disvastigis  post la populariĝo de kriptovalutoj. FATF monitoras/kontrolas landojn por certigi, ke ilias plenumas la FATF-Normojn plene kaj efike, kaj admonas landojn se tiuj ne observas la normojn.

= =

2014-07-14  rusa BUK M1 trafis civilan aviadilon - mortis 298 homoj

Hodiaŭ nederlanda kortumoparolis la verdikton kontrau 3 viroj : 1 el Ukrajno (ano de Doneckaj ribeluloj) kaj 2 rusoj ricevis tutvivan malliberejon - eĉ se Rusio ne eksportos tiujn, nun estis klara afero. La kvara akuzito (ankaŭ el Rusio) estis ne kondamnita, ĉar mankis pruvoj kontraŭ tiu.

Estis pruvita, ke la rakedo estis transportita el Rusio al la jam uzurpita de Rusio regiono oriente de Ukrajno, de tie ĝi estis lanĉita.

Kompreneble komence Rusio klopodis kaŝi la aferon pere de falsaj informoj.

(jen informoj en Vikipedio, tre detale en la germana ktp., tre koncize en Esperanto): https://de.wikipedia.org/wiki/Malaysia-Airlines-Flug_17

Informo pri la vedikto: https://www.tagesschau.de/multimedia/video/video-1116385.html

---

2022-11-17  Rusoj ŝteladas  kulturajn valoraĵojn - ekzemple el muzeoj en Cherson kaj detruis ...

s.Uhl de la germana arĥeologia instituto raportis pri la grandskala ŝtelado flanke de rusoj en Cherson [Ĥerson]. Krome muzeoj kaj publikaj bibliotekoj estis atakitaj de rusaj rakedoj. Temas pri atako al al ukrajna kulturo. Alia milit-celo de la rusa registaro.

(laŭ Deutschlandfunk.de)

---

2022-11-15  G20 majoritate kondamnas Rusion

Dum G20-konferenco en Bali rezultis i.a. ke „la plejmulto de la 20 ŝtatoj akondamnas  je la plej akra grado la militon de Rusio kontraŭ Ukrajno.“ Krome estas klara kritiko kontraŭ la „minaco pere de atomarmiloj“. Tiun formulon eĉ akceptis Sergej Lawrow, kaj li aŭskultis la TV-paroladon de la ukrajna prezidento. Vespere li revojaĝis.

https://www.handelsblatt.com/dpa/gipfel-auf-bali-russland-geraet-auch-beim-g20-treffen-unter-druck/28809532.html

- -

2022-11-15  Rakedo trafis domon en Przewodów en Pollando

Du rakedoj flugis trans la limon al Pollando, mortis du homoj. Ankoraŭ ne klaras ĉu estis ukrajna defendo-rakedo (kontraŭ rusa rakedo-atako), kiu maltrafis sian celon kaj flugis al tiu loko ?

Ĉiukaze, sen la amasa rakeda atako el Rusio Ukrajno ne necesus sendi defendo-rakedojn.  (laŭ tagesschau.de)

- -

2022-11-15  Detruo de civila infrastrukturo, modelo de Putin: Leningrada Sieĝo

Rusio sendis ĉ. 100 rakedojn aŭ dirigeblajn obusojn al ukrajnaj urboj - en ĉiuj regionoj de Ukrajno. Entute ĉ. 80 estis kaptitaj. Sed aliaj daŭrigis la detruon de civila infrastrukturo. Momente Ukrajno estas en mallumo, ĉar ofte mankas elektro, ankaŭ la akvo-provizo mankas en pluraj urboj.

Komento de AVE/mw: Jam antaŭe granda parto de la civila infrastukturo estis detruita. Do, ĵus antaŭ la komenco de vintro, okazis denove militkrimo. Tiu rememoras al la sieĝo kaj bombado de Leningrado flanke de la germana nazia armeo, kiu dum 1000 tagoj plejparte sieĝis la metropolon - restis nur la Ladoga Lago por transportoj dum vintro. Tiam mortis 1 miliono da civiluloj, kaj 500.000 soldatoj de la Ruĝa Armeo.

Komento de AVE/mw: mi legis pri tio de Anna Achmatowa.k.a., vizitis la muzeon pri la sieĝo en Leningrado (1989) - nuntempe estas malpermesite.

= =

2022-04-07  Maldekstra klarigo pri la imperiismo kaj milito de Rusio

Jen artikolo de eks-sovetia organizaĵo (left east) pri/kontraŭ tiu milito, verkita en la angla jam en Aprilo.

Bardhyl sendis la Esperanto-version, en Sennaciulo 2022/5 (ĵurnalo de SAT) , traduktia de Gary Mickle, evidente el sindikalista organizaĵo labourstart.org.

http://neniammilitointerni.over-blog.com/2022/11/kontrau-la-rusia-imperiismo-artikolo-aperita-en-sennaciulo-n-03-04-de-marto/aprilo-2022.html

https://lefteast.org/against-russian-imperialism/

https://lefteast.org/editorial-board/

2022-11-09   Rusio pretas marĉandi - je siaj kondiĉoj

tio signifas: oni ne diskutu pri Krimeo, la jam akaparitajn regionojn de Donbas kaj Luhansk, krome pri tiuj terenoj kiujn Rusio jam okupiĝis ĝis Septembro 2022.

(fonto: Deutschlandfunk, 2022-11-09, 9:15)

Mi supozas ke tio ne estas honesta propono.

- -

2022-09-08  Libro de Khodorkovsky pri la sistemo Putin

Li montras - ankaŭ el personaj spertoj - kiel Rusio nuntempe funkcias. Kiel eblus malakrigi la ambiciojn de la Kremla imperio. Jen : parolado en la rusa kaj traduko en la anglan:

https://www.youtube.com/watch?v=Rj5cW9tnsd0&t=395s

= =

2022-11-03  Svisio ne donas municion al Ukrajno

Pro la neŭtraleco Svisio malakceptis la eksporton de municio por la  „Gepard"-tanko. Tiu tanko batalas kontraŭ aviadiloj. Ĝi en plu estas uzata por la germana armeo, sed por kelkaj aliaj en EU. La municio (35 mm) - supozeble ankaŭ la pafilo (?) - estas produktata de la svisa firmao Oerlikon. Ĉar estas maŝinpafilo, oni bezonas multajn obusojn.

Tiu informo troviĝas inter pluraj aliaj raportoj ĉe:

https://www.n-tv.de/politik/16-56-Ex-Model-spricht-im-zerbombten-Tschernihiw-ueber-Traumata--article23143824.html

Komento AVE/mw: Stranga afero, dependi de neŭtrala lando, kiu ne pretas liveri (rekte aŭ nerekte) al alia neŭtrala lando; ĉi-kaze Ukrajno, kiu estas atakata de Granda Najbaro. Fakte mi ne scias ĉu Svisio liverus rekte al Ukrajno ?

- -

2018   la rusa reĝimo kaptis gejunulojn pere de fie noditaj kaptiloj

Kelkaj gejunuloj - reala ekzemplo estis 17-jara junulino, inkluzive de siaj gepatroj - estis allogitaj (pere de FSB-ulo) pri ĝeneralaj temoj: ekologio kaj socialaj vivotemoj. Por pli facile renkontiĝi ili luis loĝejon (kiu pagis ??), tie alvenis ankau 2 iomete pli aĝaj (fakte junaj oficiroj) kiuj iĝis gvidantoj de la grupo, nevideblaj kameraoj filmis tie. Pli kaj pli malvaste iĝis la „aranea reto"; ĝis la gvidantoj proponis verki flugfoliojn kontraŭ Putin-on. Tiam la kaptilo fermiĝis.

La junuloj estis torturitaj, elektrike oni premis konfeson (almenaŭ videbla de unu el ili), ke ili volis faligi la reĝimon. La faŝisma registaro kune kun la juĝistino plene ludis siajn rimedojn kaj sendis ilin al plurjara malliberejo. Ankaŭ subteno de diversaj organizaĵoj (inkluzive de Memorial) ne helpis.

https://www.arte.tv/fr/videos/108463-000-A/pieges-par-poutine/

https://www.arte.tv/de/videos/108463-000-A/gefangen-in-putins-russland/

= =

1986-04 Koncerto de Vladimir Horowitz en Moskvo

Li revenis en aĝo de 80 jaroj post 60-jara ekzilo al Moskvo - kiam komenciĝis Glaznost kaj Perestrojka. Li delonge ne ludis pro depresioj. Sed nun reveninte en iomete pli liberan Sovetunio li regajnis la emon kaj forton ludi. Jen - videbla kaj aŭdebla ĝis la 14a de Novembro 2022:

https://www.arte.tv/de/videos/082786-003-A/vladimir-horowitz-das-moskau-konzert-1986/

2022-10  Propagando de Rusio - Falsaj Informoj

jen tre detala raporto inkluzive de historio kial kaj kiamaniere Rusio post la jaro 2000 plifortigas kaj akrigas la informon cele al propagando. Jen nur listo de la celoj & manieroj el Vikipedio:

La porrusia propagando havas diversajn celojn laŭ la celita publiko (ĉu rusia ĉu fremda, ĉu

progresema ĉu tradiciema, ktp) kaj la okazo. Ili povas esti:[65][66][67][68][69][70]

- pravigi rusiajn agojn kaj malpravigi la fremdajn (ĉefe okcidentajn)
- malebligi ĉiun provon kritiki la rusiajn klopodojn, ĉu ĝi estus maltaŭga, maljusta, aŭ tro riskema
- kredigi ke Rusio estas normala, stabiliga, nur-sindefendema potenco, kaj ke la okcidentaj landoj estas dekadencaj, morale disfalantaj kaj agresemaj
- dubigi pri ĉiuj informaĵaj fontoj, eĉ la plej faktemaj, por instigi al kredo ke ĉiuj rakontoj estas egale verecaj
- malkredindigi fremdajn ŝtatojn, instituciojn kaj amaskomunikularojn
- instigi al indiferentenco pri rusiaj agoj kaj al nekritikemo de porrusiaj propagandaj klopodoj
- igi homojn relajsoj, ĉu konscie ĉu ne, de porrusia propagando
- tiel forviŝi en la opinioj la malsamecon inter la rusiaj popolo kaj kulturo kaj ties gvidantoj, kiel ĉiu kritiko kontraŭ la politikoj de la rusia registaro taksindus "rusofobia"
- krei kolektivan penssistemon fondita sur naciismo, malliberalo, konservatismo kaj malprogreso de homaj rajtoj

https://eo.wikipedia.org/wiki/Propagando_en_Rusio

Jen serio da koncizaj dokumentaj filmoj pri falsaj informoj (Fake News) el Rusio klarigitaj de ĵurnalistino de la ekzil-rusa televido Doĵd (pluvo).

https://www.arte.tv/de/videos/RC-022858/fake-news/

2022-1031  Rusio perdas 3 batal-helikopterojn

Ili troviĝis en la regiono Pskov, nur 150 km for de (au proksime al) la limo al Estonio.

Ili eksplodiĝis. Temas pri kvarono da tiaj helikopteroj en Rusio - laŭ n-tv.

https://www.n-tv.de/politik/Ukraine-Drei-Hubschrauber-nordwestlich-von-Moskau-zerstoert-article23687116.html

2022-10-31  Rusaj spionoj sendas dronojn al norvegaj nafto-platformoj

Kelkaj  homoj estis malliberigitaj ĉar oni trovis pruvojn ke ili kunlaboras kun Rusio. La komuna limo estas longa 198 km.

https://www.n-tv.de/politik/Norwegen-versetzt-Militaer-in-erhoehte-Alarmbereitschaft-article23686605.html

Komento AVE/mw: en Ukrainio Rusio bombas civilan infrastrukturon, pro tio eblas ke ili ankaŭ faras tion en la najbaraj landoj kiuj aliĝis al NATO.

2022-10-21  Rusio ŝtelas grenon de ukajnaj kamparanoj

Pere de satelitaj fotoj eblis sekvi la vojon de rusa ŝipo, kiu evidente estas de ukrajnaj kampoj. La kargo-ŝipo „Mikhail Nenashev“ malŝaltas la videblecon por atingi havenon de Sewastopol. Ekzemplo montris ke ĝi ŝarĝas 27.000 tunoj da tritiko. Nur 7 tagojn pli poste ĝi reaktivigas la transpondron - dum la vojo trans Bosporus - poste denove malŝaltas por finfine troviĝi en la siria haveno Tartus. (tre koncize). Ankaŭ tio estas milit-krimo !

https://www.tagesschau.de/investigativ/ndr/russland-ukraine-getreide-101.html

= =

2022-11-03/04  Tibetaj infanojn volas esti tibetaj - PRĈ devige edukas ilin al la registara pensmaniero

Okaze de la renkontiĝo de ministroj de la G7-ŝtatoj je la 3a de Novembro 2022 en

Muenster (Germanio) la amikoj de la tibeta popolo petas tiujn ministrojn postuli de la registaro de P.R.Ĉinio fini la sistemon de devigaj internatoj por preskaŭ 1 miliono da tibetaj infanoj kaj junuloj (inter 4 kaj 18 jaroj) kie ili devas forgesi sian kulturon kaj historion.

Jen peticio - vi povas elekti el pluraj eŭropaj lingvoj (krome estas en la ĉina kaj tibeta):

https://actions.tibetnetwork.org/de/g7-schutz-fuer-tibets-kinder

Komento de AVE/mw: Fakte simile temas pri milionoj da ujguroj, kiuj troviĝas en cerbo-lavejo-koncentrejoj (mi jam raportis pri tio)

2022-1018 Rusio terorigas tutan Ukrajnon - atakas la civilan infrastrukturon kaj loĝejojn

Jen detala artikolo de BBC pri la nunaj pli-intensigo de milito kontraŭ la civiluloj en Ukrajno - ne nur en Kherson, sed ankaŭ en multaj urboj de la tuta lando.

(en la angla) https://www.bbc.com/news/world-europe-63309095

Jen pluraj artikoloj en la germana; ekzemple ankaŭ pri Irano - same terorisma registaro kiel Rusio - kiu vendas dronojn al Rusio por ataki loĝejojn. Almenaŭ kelkaj el tiuj estis detruitaj jam en la aero.

https://www.tagesschau.de/thema/ukraine/

Jen rektaj rakontoj de rusaj soldatoj kaj civitanoj - el Burjatio (oriente de la Bajkalo) - kiel ili travivis la militon en Ukrajno. En la franca, germana kaj pola lingvoj:

https://www.arte.tv/fr/videos/090637-068-A/arte-regards-soldats-russes-le-lourd-tribut-de-la-minorite-bouriate/

https://www.arte.tv/pl/videos/090637-068-A/re-buriaci-przymusowi-zolnierze-putina/

https://www.arte.tv/de/videos/090637-068-A/re-russlands-soldaten/

= = =

2022-10-07 Nobel-Premio pri Paco de 2022 i.a. por Memorial

jen raportaĵo (en la franca kaj germana - kelkfoje oni aŭdas la originalajn rusajn parolojn) pri la rusa NRO Memorial, ekzemplo el ilia laboro. Ili monitoras la viktimojn de la komunisma reĝimo de Sovetunio. Ili subtenas la familiojn de tiuj kiuj mortis en Gulagoj, aŭ de kelkaj malmultaj kiuj malgraŭ la kondiĉoj tie supervivis.

Memorial estis malpermesita 2021-12-28 fakte de la rusa reĝimo - formale post juĝ-proceso je la Supera Juĝkortumo en Moskvo.

https://www.arte.tv/de/videos/107303-000-A/russland-verbot-der-ngo-memorial/

Irina Ŝĉerbakova, unu el la fondintoj de Memorial, diris ke paco nur eblos post la venko de Ukrajno; kaj ke tiu milito tre damaĝas al la propra lando. (DLF, pri „Memorial“ 2022-10-10)

Jen temas pri mortintaj deportitoj, en la urala regiono Perm, kie ili konstruis fervojon. La patro de Antanas - deportita 1945 el Litovio mortis tie pro malsato. Stalin decidis pro strategia decido redukti la kvanton da litovoj, latvoj kaj estonoj kaj anstataŭigi ilin per alportitaj en la 3 baltiajn landojn etnaj rusoj. Aliaj deportitaj estis de Rusio, ajna produktita kulpo sufiĉis por deporti homon.

Memorial postulas ke ankaŭ en Rusio ne nur remeoras pri la brilaj venkoj de SU super nazia Germanio, sed oni ankaŭ rememoras pri malbelaj flankoj de la propra historio, la Gulagoj; simile kiel oni faras tion en Germanio aŭ aliaj landoj.

Alia regiono estas je la bordo de la Pacifiko, ĉe Magadan, ĉe la rivero Kolyma, kie troviĝis

multaj Gulagoj. Tie homoj devis labori, kun maltaŭgaj vestaĵoj. La patrino de Pavel estis 18 kiam ŝi estis deportita al Kolyma - ekzemple por ekspluati oro-minejon.

https://www.arte.tv/de/videos/090637-074-A/re-auf-knochen-gebaut/

Pli pri tio: ekzistas pluraj libroj pri tio, ekzemple „Arĥipel Gulag“ de Solŝenicin.

„Muzeo sen gvidanto“: en la angla
www.europeana.eu/de/item/125/contributions_034f20b0_6483_0138_5351_6eee0af75849

https://www.europeana.eu/de/collections/place/195160-perm-krai

= = =

2022-10 Rusa milito kontraŭ Ukrajno - filmaj dokumentoj:

Jen tekstoj en 5 EU-lingvoj - videblaj dum longa tempo (1 jaro aŭ pli):

Jen pri Isjum - re-liberigita fine de Septembro - oni elfosas mortigitajn homojn, kiuj estis simple enterigitaj en arabro kun sabla grundo; ili montras spurojn de torturo. Okazis bombado de civila infrastrukturo (dank' al kunlaborintoj kun Rusio, kiuj transdonis la koordinatoj): infanĝardeno, malsanulejo, policejo.

https://www.arte.tv/en/videos/111135-000-A/arte-reportage/

Jen koncizaj dokumentoj nur en la franca kaj germana:

Mensogoj de la reĝimo; mobilizo de soldatoj - junaj viroj fuĝas en la eksterlandoj: Kartvelio, Kasaĥio, Norvegio:

https://www.arte.tv/de/videos/107710-239-A/russland-unzensiert/

Virinoj en Rusio protestas kontraŭ la milito:

https://www.arte.tv/de/videos/107710-227-A/russland-frauen-fordern-kriegsende/

La mortintaj soldatoj el Siberio: relative granda parto de la rusaj soldatoj venas de Burjatio (oriente de Bajkal-lago); se ili mortigitaj revenas la reĝimo malpermesas publikigi tion kaj ne iliajn nomojn. La salajro esti soldato estas plurfoje pli alta ol normala salajro:

https://www.arte.tv/de/videos/107710-118-A/russische-journalisten-informieren/

Rusaj rifuĝintoj en Turkio - intervjuoj, ĉefe kun junaj virinoj kiuj ne plu volas vivi sub la mensoga reĝimo en Rusio.

https://www.arte.tv/de/videos/107710-101-A/russische-journalisten-informieren/

Rusaj rifuĝintoj en Kartvelio:

https://www.arte.tv/de/videos/107710-099-A/russische-journalisten-informieren/

= =

2022-10-07 Paco-Premio de Norwega Nobel-Komitato

Ales Bialiatski, Belarus - fondis Viasna, kiu laboras kontraŭ torturo en Belarusio;

Memorial, Rusio - monitoras la viktimojn de la komunisma reĝimo de Sovetunio, estis malpermesita 2022 de la rusa reĝimo;

Center for Civil Liberties - subtenas la ukrajnan civilan socion, dokumentis milit-krimojn kontraŭ civiluloj.

– – –

2022-10-06  Informoj pri la milito el Rusio kaj Ukrajno

Diversaj historiaj informoj kaj pozicioj: i.a. de Memorilal, Weißmeer-Kanal,

„Kompromat“ - Dissidenten werden irgendwelche Straftaten angehängt.

Arte ĉiam sendas en la franca kaj germana lingvoj, kelkfoje ankaŭ en angla, hispana, itala aŭ pola:

https://www.arte.tv/de/videos/103642-000-A/russland-wie-putin-die-geschichte-sehen-will/

- -

Plej multaj rusaj soldatoj venis el Burjatio kaj Siberio - eble tial multaj rusoj (en la okcidenta parto) ne tro interesiĝis pri la milito, ne rimarkis la politikan, psikologian minacon kontraŭ Rusio.

https://www.arte.tv/de/videos/111205-000-A/russland-in-burjatien-regt-sich-widerstand/

https://www.arte.tv/de/videos/111160-000-A/verschleppt-und-gefoltert-im-donbass/

- -

SOT  Shanghai Org. pri Kunlaboro

https://www.arte.tv/de/videos/110291-001-A/mit-offenen-karten-im-fokus/

- -

Raportoj el Ukrajno

https://www.arte.tv/de/videos/107710-218-A/ukrainische-reporter-innen-berichten/

= =

2022-10-02  Internacia Tago de Senperforto

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_tago_de_senperforto

Mi alkroĉas foton de monumento en Rusne (urbo en la delto de Nemunas, je la limo al Kaliningrada Regiono) kiu montras Mahatma Gandhi kune kun Hermann Kallenbach,.Tiu subtenis lin en Suda Afriko (ĉ. 1906). Gandhi naskighis je la 2a de Oktobro 1869, li estis mortpafita je la 30a de Januaro 1948 de hindu-fanatikulo. Gandhi en suda Afriko la unuan fojon praktikis la metodon de civila malobeo - laŭ teorio de H.D. Thoreau.

- -

2022-09-30  Putin „akceptis“ la rezulton de la referendumo en 4 teritorioj de Ukrainio.
Putis parolis en pompa situo sur la plej granda salono en Kremlo, kaj tuj poste publike sur la Ruĝa Placo.
Li minacas pliajn paŝojn de Ukrajno defendi sian teritorion inkluzive de atombomboj. La plej terura armilo kiun timas ĉiuj.

Tiu referendumo okazis en ne-formala formo, estis 2 demandoj (pri Aŭtonomio kaj pri aliĝo al Rusio) sed nur 1 ebleco akcepti aŭ malakcepti entute.
Laŭ tiu-ĉi Rusio akaparus 15%, kune kun Krimeo 20% de la teritorio de Ukrainio. k.t.p.
Fari referendumon en regiono kie parto de la homoj devis fughi -.ne estas laŭleĝa.
Mankis internacia akompano; krome policistoj aŭ milicistoj akompanis la voĉdon-helpantojn; sekreta voĉdono praktike ne eblis. Fakte - ne validas.

OSKE malakceptas la neleĝan anekson de parto de Ukrajno flanke de Rusio.
OSCE Chairman Rau, PA President Cederfelt, Secretary General Schmid & PA Secretary General Montella condemn illegal annexation of Ukrainian territory
Jen la teksto en la angla, rusa kau ukrajna:
https://www.osce.org/chairmanship/527109

- - -
La UN Sekurecokonsilio voĉdonis pri la peto de Albanio kaj Usono, malakcepti la akaparon de tiuj 4 teritorioj; sed Rusio vetois. Fakte, denove necesas ke la Plena Kunveno de UN voĉdonos.
- -
Biden kaj Blinken (Usono) kaj Michel (EU) ripetas ke iliaj registaroj kondamnas la neleĝan referendumon, kaj sekve ankaŭ la rezulton..
- - -
La ukrajna prezidento Zelenskji tuj post la parolo de Putin sendis rapidan aliĝilon al NATO; NATO garantias plian subtenon; necesas la akcepto de ĉiuj 30 membroj-ŝtatoj de NATO.
---
Evidente Rusio hodiaŭ pafis per rakedoj al aŭto-karavano sur aŭtoŝoseo, kiu supozeble celis preni homojn el Saporizhija al la libera Ukrajno: mortis 30 civiluloj, 88 estis vunditaj. Rusio neglektas - kiel ĉiam.
Jen pluraj novaĵoj en la germana:
https://www.tagesschau.de/newsticker/liveblog-ukraine-freitag-183.html

= = =

2022-09-24  Dokumentoj el Kharkiv, Isjum - post la forpelo de rusaj soldatoj,  kaj Odessa

Detruitaj konstruaĵoj, elfosigitaj mortigitaj per torturo homoj - plejparte viroj.

Juna rusa virino en Odessa, kiu fuĝis tien el Rusio kiam Rusio komencis ĉi-tiun militon, kaj subtenas Ukrainion. Ŝi volas liberecon, kiu ne estas en Rusio. Ŝi diris - lausence: „la rusoj devas sin evolui, Ruslando devas rigardi la popolojn je alia flanko de la limo kiel najbarojn; ne kiel predo. Lando kiu devas agresi najbarojn ne apartenas al la nuna tempo. Tia regno mortas, se ĝi ne plu povas etendiĝi. Rusio ĵus mortadas.“

En 2019 Ukrajno decidis ke la rusa lingvo ne plu ludas oficialan rolon. Malgraŭ tio, ke ankaŭ multaj ruslingvaj civitanoj preferas la okcidentan rigardon, kaj subtenas Ukrajnon. Certe la hibrida milito de Rusio - neleĝa anekso de Krimeo kaj de partoj de Luhansk kaj Donbas kaŭzis la malamon finfine ankaŭ kontraŭ la rusa lingvo. Juna rusa kantistino, kiu vivas ekde 10 jaroj en Ukrajno, nun tradukas siajn kanzonojn en la ukrajnan, ĉar en Rusio ŝi ne rajtis prezenti kantojn en la ukrajna. Aliaj diras ke la rusa lingvo kaj literaturo estis rigardata normala - ĝis la 24a de Februaro 2022, kiam Putin findecidis neniigi Ukrajnon.

(la filmo en la franca kaj germana, videbla ĝis la 2022-10-24):

https://www.arte.tv/de/videos/030273-879-A/arte-reportage/

Komento de AVE/mw: Kion dirus Anna Aĥmatova, Tolstoj, Solŝenicin, Boris Pasternak, Valentin Rasputin kaj aliaj rusaj aŭ Lessja Ukrajnka, Taras Ŝevĉenko, Miĥail Bulgakov kaj aliaj ukrajnaj verkistoj pri tiu milito ? Ili certe ne opinius ke la lingvo estas la malamiko ?

Mi iam lernis la rusan lingvon, ne havas tempon nun lerni ankaŭ la ukrajnan. Ĉu mi forĵetu miajn dekojn da ruslingvaj libroj ? Eble mi donacas kelkajn al la Ĝenerala Konsulejo de Rusio en Bonn. Ĵetas en ties poŝtkeston, sur kiu estas ankoraŭ skribita „Botschaft der UdSSR“ (eo: Konsulejo de Sovetunio) ! La plej valorajn mi retenos; la sekretoficeja ideologio de Putin kreis  la militon. Li kaj liaj kunagantoj ne vivos eterne, jam multaj - ĉefe junaj - ge-rusoj protestas en la lando mem - riskas malliberejon - respekton! Estas ankaŭ verkistoj en la rusa lingvo kiel Anna Politkovskaja aŭ Alexei Navalnji, kiuj aktivis por honesteco kaj libereco.

= =

2022-09-18  Irano - moral-polico kauzas morton de juna virino

Dum viroj en Irano kaj aliaj islamaj landoj estas sufiche liberaj rilate vestajhoj, virinoj en kelkaj iranaj landoj estas en morala malliberejo.

Post iometa libereco post la komenco de nova prezidento okazis perforta traktado de Mahsa Amini, pro „ne-dece portita kaptuko“ sekve de tio shi mortis - tutvershajne.

https://www.tagesschau.de/ausland/asien/iran-proteste-festnahmen-tote-101.html

- - -

2022-03-02  Ghenerala kunveno de UN kritikas la militon de Rusio kontrau Ukrainio

141 membroshtatoj subtenas la rezolucion, 35 sindetenis, 12 - chefe el Afriko ne partoprenis, nur 4 subtenis Rusion: Belarusio, Eritrea, Norda Koreio kaj Sirio.

-- krome

je la 7a de Aprilo Rusio estis ekskludita el la Homrajta Konsilio de UN.

- - -

2022-08-26  Rusio forbruligas gigantan kvanton da tergaso

Supozeble temas pri la gaso el la granda gas-dukto NS-1 - oni kalkulis ke intertempe (dum pluraj tagoj) temas pri pli ol 4 milionoj kubaj metroj da metano.

https://www.deutschlandfunk.de/grosse-mengen-gas-nahe-nord-stream-1-werden-abgefackelt-102.html

- -

2022-09  mistero pri mortoj de multaj oligarhhoj kaj estroj de grandaj rusaj firmaoj

Jen la listo kaj bazaj :informoj

https://www.youtube.com/watch?v=IbOBflFIHmU

- -

2022-09  Novajhoj el la milito de Rusio kontrau Ukrainio - kaj falsigata Referendumo

Decido pri parta mobilizacio de 10% de la rezervistoj kauzis ke multaj junaj viroj fughis eksterlanden. Aliaj - ekzemple de nomenklaturaj familioj povas eviti tion, kion ni audis de filo de Dmitri Peskow, proparolanto de Kremlo. Aliaj estas pli gravaj por la lando, IT-specialistoj kaj propagandistoj.

https://www.tagesschau.de/ausland/europa/peskow-sohn-anruf-einberufung-101.html

Putin volas rapidan sukceson, tial organizas referendumojn en la okupitaj ukrainiaj terenoj. Imageble, tiamaniere organizita referendumo tute ne validas; la plejmulto de registaroj ne akceptos la rezulton. Jen intervjuo kun spertulo.

https://www.tagesschau.de/ausland/europa/jurij-sobolewskij-103.html

1991/2022-09-22  Sendependigho de Ukrainio - respondo de rusaj civitanoj - multaj soldatoj mortis

Ni gratulas Ukrainion - kaj aparte manifestaciis vid-al-vide de la ghenerala konsulejo de Rusio en Bonn-Bad Godesberg.

Ni: tio estis membroj de Verda Partio en tiu urbo, civitanoj de diversaj landoj kaj pli ol 10 ge-ukrainianoj, kiuj parolis per lautparolilo, kaj ekzemple kantis la ukrainan himnon. Je Jhaudo akompanis nin violonisto kun bela muziko el Ukrainio.

Lau mia sperto, dum tiu duona jaro de rusa milito kontrau Ukrainio, la civitanoj kiuj vizitas la konsulejon dum la tempo pli kaj pli reagas pozitive al nia manifestacio (du-foje semajne matene dum 2 horoj). Ech tiuj kiuj preferas Sovetunion - pro la iama sociala sekureco - deziras pacon. Oni ne scias precize kiom da rusaj soldatoj mortis intertempe - antau fino

de Septembro - ch. 55.000.

lau tiu fonto: https://de.euronews.com/2022/07/28/laut-us-angaben-75000-tote-russische-soldaten-in-der-ukraine

https://de.euronews.com/2022/09/22/krieg-gegen-die-ukraine-russlands-probleme-mit-nachschub-an-soldaten

- -

2022-09-18 pliaj rusaj kritikantoj: Alla Pugachova,

maljuna konata bardino/kantistino, kritikis la militon. Shia edzo Maxim Galkin tuj post la komenco de tiu milito kontrauis, kaj ricevis titolon „eksterlanda agento“. Shi substrekis ke ankau shi kontrauas chi-tiun militon. Jen en Vikipedio - ankau en la rusa kaj kelkaj aliaj lingvoj.

- -

2022-08-24 iama urbestro de Ekaterinburg arestita - pro Artikolo 280.3

Jewgenij Roisman estis urbestro de Ekaterinburg inter 2013 kaj 2018.

Evidente li kritikis la militon de Putin kontrau Ukrainio, kio estas malpermesata pere de Art. 280.3 .

Multaj civitanoj kunvenis kaj protestis. Je la 25a li rajtis reiri hejmen, sed ne rajtas publike agadi dum tuta Septembro.

https://de.wikipedia.org/wiki/Jewgeni_Wadimowitsch_Roisman

- -

2022-06-28 Oleg Deripaska kritikas la militon kontra Ukrainio

Tiu rusa oligarhho diris: „Chu estas en la intereso de Rusio detrui Ukrainion ?

Kompreneble ne, tio estus giganta eraro.“

Deripaska posedas plurajn fabrik-entreprenojn.

Fonto: Badische Zeitung, 2022-06-29, p.7

= ==

2022-06-23 Moldavio kaj Ukrainio akceptitaj kiel novaj EU-kandidatoj - taskoj por Kartvelio

kaj potencialaj kandidatoj ankorau estas Bosnio k. Hercegovina.

Gratulon al tiuj 2 registaroj, ke ili ricevis la statuson de alir-kandidatoj al EU.

Kartvelio devas ankorau plenumi plurajn taskojn ene de duona jaro por atingi la saman.

Aliaj kandidatoj estas: Albanio, Montenegro, Norda Makedonio, Serbio kaj Turkio.

Tiuj iom grumblis* char ili delonge atendas al plia pasho. Sed lau EU ili ghis nun ne plenumis la Kriteriojn de Kopenhago.

Alia grava baro estas la veto-rajto de unuopaj registaroj; tiamaniere kelkaj decidoj de la EU

bezonas akcepton de chiuj membroshtatoj. Jam ekzistas ideoj de unuopaj registaroj kaj de NRO-oj shanghi al majoritata principo. Nur post tio devus okazi la enmeto de novaj membroshtatoj.

https://de.wikipedia.org/wiki/Europ%C3%A4ische_Union

au - en la angla:

ec.europa.eu/neighbourhood-enlargement/enlargement-policy/steps-towards-joining_fr

*) Ankau grumblis la Kremlo, char tio signifas ke finfine Ukrainanoj atingis tion kion ili jam volis en Novembro 2013, pro kio komencis la Euro-Majdan en Kievo cha la prezidento Janukovich ne akceptis la decidon de la parlamento - poste la parlamento denove decidis, kio signifis la finon de la prezidenteco. Dum la manifestacioj ankau la granda korupcio chirkau la prezidento chagrenis la civitanojn, kaj finfine li fughis al Rusio.

https://de.wikipedia.org/wiki/Ukraine#J%C3%BCngste_Vergangenheit

(en Esperanto evidente pli afabla al Kremla vido):
https://eo.wikipedia.org/wiki/Ukrainio#Moderna_historio_de_Ukrainio

https://www.zdf.de/nachrichten/politik/moskau-eu-erweiterung-ukraine-krieg-russland-100.html

- -

2022-06-21 Fino de Sovetunio - kaj sekvoj - Kaliningrado kaj Litovio

https://www.arte.tv/de/videos/101913-000-A/das-erbe-einer-weltmacht/

Antau kelkaj tagoj Litovio decidis apliki la sankciojn de EU kontrau Rusio. Tio signifas ke ili ne plu permesas la shargh-trajnojn el au al Rusio trans Litovio, se tiuj havas varojn kiuj trovighas sur tiu listo (ekzemple metaloj).

Komento de AVE/mw:

Post la senedependeco Litovio garantiis al Rusio uzi tiun trajn-koridoron de Belarus al la Kaliningrada Provinco. Indas rimarki ke Kaliningrado ja havas havenon kaj oni povas transporti varojn per shipo.

La respondo de la Kremlo estis ke Litovio agas kontrau tiu kontrakto, kaj audeblas vochoj el la Kremlo kiuj pripensas pri milita alpreno de tiu koridoro, kiu tranchus la Baltiajn Shtatojn de Pollando.

Sed aliflanke Rusio mem ne plenumis kontraktojn: aparte chi-tiun kun Ukrainio (kiam Rusio heredis la atombombojn de SU, kiuj trovighis tie). En chi-tiu Memorando de Budapesto - de 1994 - Rusa Federacio garantias al Ukrainio la sendependecon kaj la tiamajn limojn, al tiuj ankau apartenis Krimeo !

Kaj intertempe la nova Caro , Vladimir V. Putin - se oni rigardas la konduton chirkau li en la Kremlo kaj lian palaston apud Sochi , tio similas al carismo - volas neniigi Ukrainion.

Oni povus demandi aliflanke, chu tiu regiono Kaliningrado - la nomoj por la chefa urbo estas en la pola Krulevich (regho-urbo), en la germana traduko Koenigsberg (urbo de filozofo Kant), nepre devas resti parto de Rusio ? SU ricevis ghin post la milito, kaj ankau partojn de Pollando kiuj nun trovighas en Ukrainio kaj Belarus. Oni shovis la limojn de Pollando okcidenten. Pro tio Germanio devis rezigni pri terenoj oriente de la Odro. Germanio akceptis tion kiel kompenso pago por la Hitlera milito kontrau Rusio. Germanio estas sufiche granda.

= =

2022-06-19 Homoj en Kaliningrado - iama Koenigsberg

jen interesa konciza raporto (13 minutoj) de ARTE.tv pri la nuna situacio en Kaliningrado*

Videbla ghis 2052-05-21 (mi supozas ke devus esti 2025 ?)

https://www.arte.tv/fr/videos/109058-000-A/russie-kaliningrad-l-enclave-de-poutine/

https://www.arte.tv/de/videos/109058-000-A/russland-kaliningrad-die-exklave-von-putin/

Unue pro la kronviruso kaj nun pli longetempe tiu insula provinco de Rusio estas kvazau tranchita de la polaj kaj litovaj najbaroj, kaj de multaj aliaj turistoj, pro la speciala milito de

la rusa prezidento Putin kontrau Ukrainoj. Kutime la homoj en K. preferas malparoli pri tiu milito; pluraj diras lau la vortoj de Putin; tamen estis kelkaj kiuj rekte parolis kontrau tiu milito. Kuraghuloj, char estas risko oponi la reghimon.

Kuragha virino mencias kiel argumento kontrau tiu milito la Kategorian Imperativon de Immanuel Kant, kiu vivis kaj laboris en tiama Koenigsberg - lia tombo trovighas antau la katedralo. Aktuale - okaze de tiu milito - mi legas lian libreton (kopio de 1946 de la originala eldono de 1795) - filozofian traktajhon - „Zum ewigen Frieden“; en ghi mi trovis ke estis eldonita ankau en Esperanto 1924 „Al eterna paco“, tradukita de Paul Christaller.

Tiu traktajho klarigas la diversajn manierojn kiuj gvidas al milito, kaj chefe la mensan kondichon kiu necesas ne komenci militon pro iu ajn chagreno au alia manio.

https://eo.wikipedia.org/wiki/Kategoria_imperativo

*) certe Europanoj scias ke tiu provinco rekte najbaras al Litovio, kaj ke la Kurona Duoninsulo apartenas duone kaj al Rusio kaj al Litovio kaj finas nur kelkajn cent metrojn antau Klaipeda (germana nomo: Memel), kie chi-jare okazos BET-56.

= =

2022-06-12 Rusio ne venku - forlasu Ukrainion - pagu

Komento de AVE/mw:

mi spertas - kiam ni manifestacias antau la Ghenerala Konsulejo de Rusio en Germanio - ke pli ofte ghia klientoj afable mansvingas al ni.

Kelkaj de tiaj rusaj civitanoj ankorau mencias usonajn milit-krimojn por kashi la kulpon de la propra lando. Ili ne volas rememori la krimojn de rusoj en Afghanio dum SU, de la reghimo de Putin en Chechenio, la shovado de siaj limoj en Kartvelion, kaj ekde 2014 en sud-orientan Ukrainion, kaj la hibridan transprenon de Krimeo malgrau tio ke 1994 Rusio garantiis la limojn kaj suvereneco de Ukrainio (Memorandum of Budapest) !

Pli kaj pli da rusaj civitanoj komencas malfidi la propagandon de la rusa reghimo, kaj iras en ekzilon. En Germanio ili ja povas vidi aliajn fotojn kaj informojn ol en Rusio mem.

Rusio dum tiu milito baris la vojon por eksporti ukrainian tritikon per shipo al eksterlando. Tio kauzas i.a. plimultigon de malsat-mortoj en Afriko kaj altigon de prezoj tutmonde. Rusio transportas parton de la greno al sia lando, mi audis ke ili ankau shtelas bildojn kaj artajhojn el muzeoj. La detruo de kultura heredajho, de loghdomoj kaj de civila infrastrukturo sumighas kiel kultura kaj fi-agoj de rusaj soldatoj signifas rektan genocidon.

Rusio ankau shtelas homojn por „filtri“ ilin; simile al la (ne nur kultura) genocido de P.R.Chinio en Orienta Turkestano (Xin Jiang) kaj Tibeto.

Denove pri la rusa lingvo en Ukrainio: se en kelkaj regionoj de Ukrainio okazis nekonvena malrespekto, eblintus akuzi tion je la Europa Konsilio ktp..

Denove pri la denunco de ukrainoj kiel „fashistoj“; tion ni ankau audis kelkfoje. Ukrainaj civitanoj estas fieraj pri sia lando, amas sian kulturon kaj lingvon, kiu estis marghenigita dum la lastaj jarcentoj; tio estas patriotismo.

Aliflanke la reghimo de la sekrekt-servulo Putin en Rusio ighis dekomence pli kaj pli fashisma. Chu ankorau unu el niaj rusaj (viraj) geamikoj ne kredas tion ? Tiam mi volonte kolektas la pruvojn. Chiu tago de tiu milito detruas ne nur Ukrainion, sed ankau Rusion mem (la reputacio de Rusio en granda parto de la mondo estas sub Nulo ); aliaj landoj preter-rigardas (kaj sindetenas); chu ekzistas iu ajn libera shtato kiu konkrete subtenas chi-tiujn milit-krimojn ?

Lau Vikipedio 141 shtatoj akceptis la deklaron - kondamno de la rusa invado ktp. en Ukrainio - de la Plena Kunsido de UN je la 2a de Marto 2022: 35 sindetenis, 12 afrikaj shtatoj ne partoprenis, kaj nur 4 aliaj shtatoj malakceptis la deklaron: krom Rusio estis Belarus, Sirio, Eritreo kaj Norda Koreio. Gratulon al Putin pri tiaj amikoj !

Komento de la sudafrika episkopo Desmond Tutu:

„Se vi restas neutrale okaze de maljusteco - vi elektis la flankon de la subpremanto.“

Feliche UEA ne restis je sia neutraleco, sed priplendis klare la invadon iniciatita de la rusa registaro.

- -

2022-05-18  Svedio kaj Finnlando petas alighon al NATO.

Rusio plendas ke NATO alshovis sin al la limo de Rusio. Temis pri la iamajn membrojn (devigitaj membroj) de SU kiuj plej rapide serchis la protekton de NATO.

NATO respektas la limojn de Rusio - lau 1994. Tiam Krimeo apartenis al Ukrainio.

Rusio perforte retenis naciojn sendependighi (Omon-trupo okupis la televidan turon en Vilnius, kaj mortpafis 14 junulajn defendantojn).

- - -

1989-08-23  Balta Vojo - la baltaj popoloj elektis (delonge) pacon kaj liberecon

2022-03-11  Jen - je la jar-tago de la litova sendependeco - solidareca koncerto por Ukrainio en la Nacia Teatro en Vilnius (Litovio) okaze de la krima invado de Rusio en Ukrainion.

La kantanta Revolucio: Komence estos kelkaj fotoj de 23a de Augusto 1989 kaj informo pri tio, kiam okazis la „Baltia Vojo“ - pli ol 2.000.000 homoj faris homan chenon, 600 km longan - trans Estonio kaj Latvio ghis la okcidenta limo de Litovio. La homoj kantis.

La filmo montras Vilniuson el birda vido. La ghenerala informo estas en chiuj 6 lingvoj de Arte.tv; sed en la filmo mem estas la germana, franca kaj angla, kelkfoje subtitolita.

Koruso unue kantas kaj la litovan kaj la ukrainan nacian himnon; kaj je la fino la himnon de Europa Unio -  kun la teksto en la originala lingvo, muziko de la 9a simfonio de Beethoven.*

Inkluzivitaj estas kelkaj paroloj: de la litovaj chefministrino kaj prezidento, post minuto 32 vi audas - kaj legas en angla subtitolo - impresivan alparolon de Swetlana Tichanovskaja (kandidatino por prezidenteco en Belarus (la antaua kaj nuna prezidento fraudigis la elekto-nombrojn), la opoziciuloj en Belarus estas persekutataj de la reghimo, pro tio shi trovighas en ekzilo en Litovio  pri la milito kiun jhetis la rusa reghimo super Ukrainion. Post minuto 55 parolas la ukraina ambasadoro, kiu komparas la rusan prezidenton kun Hitler.

Pri la aliaj detaloj - litovaj kaj ukrainaj komponistoj kaj ankau ge-dirigentoj - vi povas legi (en la franca kaj germana) sub la fenestro ke la koncertejo:

https://www.arte.tv/de/videos/108273-000-A/das-litauische-nationale-opernorchester-unter-der-leitung-von-ricardas-sumila/

*)  Jen la versio de la EU-himno de Umberto Brocatelli en Esperanto, kun tradukoj en tre multaj lingvoj, inkluzive de regionaj lingvoj kaj lingvoj ekster EU (rusa, china, japana).

https://www.europo.eu/en/european-anthem

= =

2022-05-26  Homaj Rajtoj kaj Internacia Juro - multaj shtatoj neglektis ilin

Aktuale* temas pri P.R.Chinio, kiu en la tuta lando, sed ech pli kruele mistraktas civitanojn de aliaj etnoj: aparte tibetanoj kaj plej forte nun la ujgurojn. Mi jam skribis pri tio. Chinio asertas ke la ujguroj libervole vizitas la kursojn pri metio-formado, sed aliflanke ekzistas dokumento ke respondeculo CHEN Quan Guo ordonas ke kaze de fughanta ujguro el gulago, oni unue faru minaco-pafon kaj poste mortpafu la fughanton. Oni kalkulis ke povus esti 1400 gulagoj !

Jen detalaj dokumentoj (Xinjiang Police files) en Vikipedio, tie en pluraj lingvoj, sed ankorau ne en Esperanto:

https://en.wikipedia.org/wiki/Uyghur_genocide

Jen denove dokumenta filmo (105 min - ghis la 7a de Junio) en la franca kaj germana, kaj subtitolita en la hispana kaj itala. Ekzemple iu esploris malfermajn mendojn konstrui edukajn centrojn (fakte gulagojn), en kiu trovighas klare indikoj ke temas pri malliberejoj, gulagoj, inkluzive de la kompleta monitorado; kaj ili estas troveblaj en satelitaj fotoj se oni komparas kun antauaj fotoj de la sama loko.

https://www.arte.tv/de/videos/100174-000-A/china-das-drama-der-uiguren/

Kaj jen teksto de germana novjahagentejo:

https://www.tagesschau.de/ausland/asien/china-xinjiangpolicefiles-xi-101.html

Kaj jen konciza dokumento pri la konduto de la china registaro kontrau ujguroj (13 min, ghis 2023-02-10) en la franca, parte kun originalaj paroloj - temas pri multaj gulagoj, pri steriligo de virinoj, pri genocido. Estus afero por la Internacia Kortumo pri Krimoj.

www.arte.tv/fr/videos/107766-001-A/chine-le-drame-ouighour-les-coulisses-de-l-enquete/

(la sama filmo - eble iam ankau en la germana ?) :

https://www.arte.tv/de/videos/107766-001-A/china-das-drama-der-uiguren-hinter-den-kulissen/

*) Necesas rememori ke multaj registaroj faris similajn krimojn kontrau indighenaj etnoj en iliaj kolonioj (jen nur ekzemploj):

- Germanoj en Namibio

- Britoj en Hindio

- Francoj en Algherio

- Nederlandanoj

(en diversaj lingvoj) https://de.wikipedia.org/wiki/Kolonialkrieg

(ankau en la angla, sed pli koncize) https://de.wikipedia.org/wiki/Indien#Geschichte

\- - -

2022-05-25  longjara rusa diplomato che UN rezignas

Boris Bondarev finfine protestis kontrau la milit-propagando, mensogoj kaj malamo. Li taksas la aktualan politikon de Putin kruela, sensenca - kaj neeltenebla honto.

(fonto: taz.de, 2022-05-25, p. 13)

\- - -

2022-05-20  mort-serio inter rusaj oligarhhoj

Oleg Tinkov, ankorau vivas en Italio, sed li devis vendi sian parton (35%) de sia privata banko en Rusio. Li protestis kontrau la milito, kaj sekve de tio li estis devigita de la administracio de Kremlo vendi sian parton - al oligarhho Potanin. Li ricevis „Kopekojn“, fakte ch. 3% de la valoro.

https://www.n-tv.de/wirtschaft/Tinkow-beklagt-Zwangsenteignung-seiner-Bank-article23303675.html

**Stranga serio de mortintaj** / mortigitaj (?) richegaj rusaj entreprenistoj mirigas nin.

En 2022 jam 7 el tiuj, parte kune kun siaj familianoj mortis pro diversaj strangaj okazajhoj. La unua, Leonid Shulman, mortis jam en Januaro.*

https://www.newsweek.com/every-russian-oligarch-who-has-died-since-putin-invaded-ukraine-full-list-1700022

https://www.n-tv.de/politik/Sieben-tote-Oligarchen-in-knapp-drei-Monaten-Der-lange-Arm-des-Kreml-article23311033.html

*) Komento AVE/mw: La reala milito de Putin kontrau Ukrainio komencis nur je la 25a de Februaro. Tamen, la eldiro de prezidento Putin, ke la kolapso de SU estis la plej granda katastrofo de la 20a jarcento, okazis jam pli frue. Kaj monatojn antaue Rusio starigis ch. 100.000 soldatojn (?) laulonge de la limo al Ukrainio; kio povus elvoki lian kritikon.

= =

2022-05-17 Nova dokumento pri la politiko de P.R. Chinio

la filmo en la franca kaj germana estas videbla ghis la 30a de Majo; mi informis pri ghi jam lastan jaron.

(fr & de): https://www.arte.tv/de/videos/078193-000-F/die-neue-welt-des-xi-jinping/

La franca originalo subtitolita ankau en jenaj lingvoj: en, es, pl, it.

Xi Jin Ping 2018 shanghigis la konstitucion kaj faris sian regadon dumviva.

Li regas kiel diktatoro - lau propra eldiro komunisma. Dokumento no. 9 estas agreso kontrau libereco, homaj rajtoj, libera amasmedioj.

La filmo (de 2021) ankau montras la evoluon de Xi, fatalan sorton pro la komunisma politiko ( „rugha teroro“ ) de Mao Dse Dong de liaj familianoj (patro, fratino) ek de sia jun-agho. Tamen li celas ighi gvidanto de sia lando. Li laboras favore al „La China Revo“ - pelita de la honto pro la regado de la eksterlanda imperialisma shovinismo en la 19a j.c.

WANG ... subtenas totalisman evoluon; unue batalo kontrau korupcio - tiel li atingas la bonan taksadon flanke de la popolo;

Giganta kaj longdaura investo en la „Novan Silko-Vojon“ - grandaj investoj, fakte eksterlande kreditoj. Malbona ekzemplo estas giganta nova haveno en Sri Lanka, lando kiu ne povas repagi la krediton ghustatempe, sekve Chinio ricevas la havenon dum 99 jaroj. Atentu: ne nur temas pri ekonomio, sed ankau pri politika dependeco.

Grekio (haveno Piraeus) kaj Portugalio (Chinio investas en firmaoj) estas aliaj malbonaj ekzemploj - Grekio ne akceptas proteston de EU kontrau la agado de Chinio kontrau la ujguroj. Estas sistemo neutraligi ne-komunismajn registarojn.

Chinio subachetas australiajn senatorojn por ke ili defendas chinio-afablajn politikojn. Sed tio estis publikigita; pro tio HuaWei ne ricevis ordonon renovigi la e-reton. 2020 Australio subtenis la projekton esplori la komencon de la Kronvirusa pandemio en Wuhan. Chinio reagas per mal-mendo de 10% de siaj importoj el Australio.

La iama brita chefministro Cameron ighis kunlaboranto de investment-fonduso kiu subtenas la Silko-Vojo Projekton. En Francio estas Rafarin, kiu proparolas por Chinio.

Alia giganta agado okazas en Afriko. Li importas resursojn, kaj eksportas sian totalisman sistemon al Afriko. Unuflanke estas evoluo, aliflanke estas politika influo. En Dshibuti Chinio instalas milit-sidejon; kopias Usonon kiun li chiam kritikis pro similaj instaloj.

Chinio postulas la ghis tiam internacian sud-chinan maron kiel sia tereno, inkluzive de la insuletoj; kelkaj tro malgrandaj (rifoj) estis pligrandigitaj. 2017 li mensogis kaj respondis al tia demando de usona prezidento Obama: „Chinio ne intencas krei militarajn bazojn sur chi-tiuj insuloj“ (Spratley kaj Paracel-Insuloj, k.a.). Tio ne konformas al la decido de la Internacia Kortumo en Den Haag.

Sekvas 2021 celo re-unuigi Tajvanon; militaraj ekzercoj por okupi Tajvanon. Sed la tiea popolo preferas malferman politikon.

Per la Shang Hai Kooperado Xi kreas similan strukturon kiel Usono havas en la okcidento. Jen demokratioj kune kun Usono, jen autokratioj kun Chinio kiel majstro.

China politiko nun signifas: plena kontrolo, subpremo kaj neniu opozicio.

Xi, malgrau la china promeso 1997 por Hong Kong ke ili rajtas vivi lau sia sistemo ghis 2047, detranchis tian liberecon. Libro-eldonisto LAM Wing Kee estis kaptita dum 8 monatoj kaj traktita per cerbo-lavado pro la eldono de kritika libro pri Xi. Poste li iris al Tajvano en ekzilon.

En XinJiang li subpremas la ujgurojn, en 300 gulagoj traktas milionon da homoj per cerbo-lavado; 500.000 infanoj estis forprenitaj de siaj familioj por eduki ilin lau china maniero; deviga aborto je gravedaj virinoj; setligo de milionoj da han-chinoj por fari la ujgurojn minoritato en ilia propra lando.

En kelkaj urboj de Chinio Xi esploras la sistemon de „sociala kredito“ pere de preskau totala monitorado de chiuj civitanoj - rememoras al „1984“ de George Orwell. Tiel homoj estas kontinue taksataj per poentoj, se tiuj estas tro malataj ili perdas la eblecon studi, ricevi bonan laborlokon, ricevi pasporton por vojaghi eksterlanden.

= =

2022-05 Propagando ebligas al Putin „vendi“ sian militon enlande

Dum interparolo kun rusaj homoj en Germanio mi ofte audas, ke tiu milito necesas. Ili kredas al Putin. Nur malmultaj emas vere diskuti - tiam venas kiel paralelo la atako de NATO kontrau Serbio - sen mendo de UN* (char Rusio vetois). Kaj la rakonton de Putin, ke en Ukrainio estas fashisma reghimo, kaj necesas defendi la homojn tie, same kiel la aliancanoj 1945 defendis la homojn de la nazia reghimo en Germanio.

Sed Ukrainio ne estas fashisma lando. Jes, ni konstatas ke sufiche forta amo al sia patrolando kaj sekve neglekto de la rolo de la rusa lingvo en la orientaj regionoj de Ukrainio. Tio eble kauzis chagrenighon de la reghimo en Rusio. Tamen, neniel povas servi kiel argumento por la nun spertanta invado, bombado, krimoj kontrau la popol-legho: jhus nun komencis la unua akuzo kontrau reala soldato, kiu kauzis tian krimon kontrau civilulo - la unua el centoj da akuzoj. Necesas mencii ke ankau Rusio subskribis la Ghenevan Konvenciojn (1949 kaj 1954), i.a. pri la malpermeso agresi civilajn personojn dum milito.

https://de.wikipedia.org/wiki/Genfer_Konventionen#Internationale_Akzeptanz_und_beteiligte_Organisationen

Nia argumento (Verduloj estis parto de la registaro tiam) estis, ke amasa mortigo de viroj kiel en Srebrenica ne rajtas okazi denove en Kosovo, kiun Serbio proklamis kiel serbia posedajho. Pro tio okazis civitanaj bataloj, kiujn Serbio volis fini per siaj fortoj. Serbiaj milicoj je la 15a de Januaro 1999 mortigis 40 homojn (supozeble albanojn) - Tio ricevis la nomon: Masakro de Raczak / Kosovo. NATO postulis finon de tiu kvazau-milito kaj okazigis konferencon en Rambouillet. Dum 2 monatoj ne eblis trovi interkonsenton, tiel oni (NATO ?) prezentis dumtempan solvon, kiun Serbio ne volis akcepti. Pro tio NATO finfine atakis Serbion.

Char AVE rilatas kun la Verdaj Partioj, jen interesa dokumento, char la germana verda partio okazigis je la 13a de Majo unutagan konferencon pri tiu problemo; kie Joshka Fischer (tiam ministro pri eksterlanda politiko) detale klarigis sian pozicion, kaj ricevis plimulton de la vochoj - poste kelkaj homoj (kontrau-opiniantoj) forlasis la partion (*mi (MW) partoprenis chi-tiun konferencon*):

https://de.wikipedia.org/wiki/Rede_Joschka_Fischers_zum_NATO-Einsatz_im_Kosovo

https://de.wikipedia.org/wiki/Serbien#Jugoslawienkriege_1991%E2%80%931995_und_Kosovokrieg_1998%E2%80%931999

*) Ili plendas ke NATO alproksimighis kaj etendighis al la limoj de Rusio (rekte en Estonio, Pollando kaj Litovio), malgrau la parolitaj promesoj flanke de NATO (Usono kaj Germanio) ne fari tion, kiam temis pri la unuigho de ambau germanaj shtatoj. Tiam ankorau estis SU. Sed post la disfalo de SU, la klopodo de rusiaj OMON-fortoj kiuj batalis ekzemple en Vilnius por eviti la sendependighon, kaj ankau la militoj kontrau Chechenio kaj la fortrancho de Abhhazio de Kartvelio - montrighis al la novaj demokratioj (Baltio, Pollando, Chehhoslovakio, Hungario kaj Bulgario) ke ne eblas fidi al Rusio; sed pli bone sin apogi al NATO, pro tio ili petis alighon.

Pli kaj pli ankau la shangho de la politiko en Rusio, post la forpelo de Gorbachov, kun kiu oni interkonsentis pacan kunvivadon, minacis la jhus akiritan sendependecon de tiuj nacioj.

Jen tre detala dokumento (en la germana kaj aliaj lingvoj) pri chi-tiu evoluo:

https://de.wikipedia.org/wiki/NATO-Osterweiterung

Dokumento en kiu la Rusia Federacio garantiis la sendependecon de Ukrainio, t.n. Budapesta Memorando, 1994:
https://en.wikisource.org/wiki/Ukraine._Memorandum_on_Security_Assurances

Kaj jen aktualaj informoj el Ukrainio pri la paralela propagando-milito de Putin kontrau la geamikoj de Ukrainio:

(8a de Marto) https://www.arte.tv/de/videos/094279-211-A/dieser-krieg-wurde-erst-durch-die-russische-propaganda-moeglich/

(3a de Marto) https://www.arte.tv/de/videos/108105-000-A/ukraine-propaganda-gegen-wahre-nachrichten/

= =

2022-05-06  Nobel-premiitoj subtenas Ukrainion & kontrauas la militon de Rusio

pli ol 200 Nobel-premiitoj de diversaj fakoj subskribis malferman leteron.

En jenaj lingvoj: en, ru, ua: https://www.nlcampaigns.org/ukraine.html

- -

2022-05-14/15 Israelo, Naqba kaj Palesteno

Dum la 14a de Majo estas la fondo-tago de nova Israelo, la 15a estas la perdo-remortago Naqba por la palestenanoj.

Jen tro konciza informo en Esperanto. Pli detale en multaj aliaj lingvoj:

https://eo.wikipedia.org/wiki/La_Nakba_Tago

En la germana vikipedio estas bona enirejo al la tuta temaro:

https://de.wikipedia.org/wiki/Portal:Israel_und_Pal%C3%A4stina

Bedaurinde Israelo tendencas etendi sian teritorion al nuna Palesteno pashon-post-pasho. La palestenoj kiuj vivas en Israelo konsistas ch. 20% de la populacio. Plej facile estus fari komunan shtaton.

Ankorau multaj rifughintoj vivas en rifughejoj en la najbaraj landoj. La tereno ne sufichas por ke la rifughintoj povus remigradi. Aliflanke Israelo volas esti la sekura hejmo por chiuj judoj - kaze de estontaj pogromoj. La ideo de KKL (la shtata fonduso de Israelo) estas ke aliaj arabaj landoj akceptu la rifughintojn.

Tre malfacila temo. Mi esperas ke oni trovos pacan solvon.

= =

2022-03-22  Evoluo de la sendependeco de Ukrainio

Filmo de ruslingva ukraina jhurnalistino pri la evoluo de homoj en Ukrainio ek de 1917 - de mallonga sendependeco, de socialismo de Lenin, de genocido kontrau ukrainaj kamparanoj kiuj estis malsat-mortigitaj kaj la elstaraj homoj au mortigitaj au deportita en gulagojn; de komenco de libereco dum Sovetio ghis 1991. La lasta prezidento de Ukrainio kiu estis subtenita de Rusio estis La lasta prezidento de Ukrainio kiu estis subtenita de Rusio estis Viktor Janukovic̑ , korupta homo kiu ebligis posedon de firmaoj al siaj homoj. En Decembro 2013 li ne volis la alproksimighon de Ukrainio al Europa Unio. Tamen multaj homoj volis tion, char ili preferis veran demokration kaj publikajn informojn pri okazinta korupcio. Finfine je la 22a Februaro 2014 li fughis per helikoptero al Rusio; la parlamento vochdonis por la eksoficigo de li kaj elektis alian; la popolo vizitis la luksajn palacojn kiun li konstruigis en Meshyhirja kaj Soholuhhya; tuj poste Rusio akaparis Krimeon. Ukrainanoj ankau en aliaj landoj proteste manifestacias. Rusio nun daure asertas ke okazis fashisma pucho en Ukrainio. La nacia deziro al sendependeco - ankau en urboj kie homoj plejparte parolas la rusan - ne plachas al Putin. Jen tiu filmo kiu unuflanke rakontas el persona vidpunkto de la jhurnalistino inkluzive de geamikoj kaj familianoj (kiuj parte kredas la propagandon de Putin), aliflanke ghi montras la gravajn historiajn momentojn:

En la franca kaj germana, subtitolita ankau en la angla, hispana, itala kaj pola lingvoj:

videbla ghis 2022-05

https://www.arte.tv/fr/videos/108340-000-A/ukraine-la-dechirure/

- -

2022-04-16  Rusio redirektas la agreson kontrau Donbas kaj Luganska regionoj;

feliche dum pluvas estas malfacile veturi tra kampoj. Kiel revengho pro la dronigita kroz-shipo Moskva okazis pluraj bombo-atakoj. Ankorau estas mizera situacio por eble 100.000 civiluloj en Mariupol kiuj ne povas fughi, kaj pro la siegho ili havas mankon da akvo kaj nutrajhoj - la sola elirejo estas al Rusio, sed tie ili estos akceptataj kiel malamikoj. Milito kontrau civiluloj estas malpermesata de la Ghenevaj Interkonsentoj.

= =

2022.04-15  Diverse pri la Rusia milito en Ukrainio

La granda militshipo Moskva estis detruita - ne klaras chu vere Neptun-rakedo kauzis la eksplodon, kaj alfundighis proksime de Odessa.

https://www.tagesschau.de/ausland/europa/schwarzmeerflotte-russland-101.html

Evidente Rusio preparas novan invadon kaj atakon kontrau la suda parto de Ukraino.

La ukraina prezidento ne volis viziton de la germana prezidento Steinmeier (kune kun tiu de la 4 najbaroj), char tiu kaj SPD estis dum longa tempo tro proksime de Gazprom kaj la rusa prezidento, kaj hezitas liveri nun ankau tankojn al Ukrainio. Sen tankoj ne eblas reakiri la akaparitajn flanke de la rusia armeo regionojn. Li preferas paroli kun la kanceliero.

Pozitive: Ukraino kaj Rusio intershanghis po 30 militkaptitojn kaj civilulojn.

https://www.tagesschau.de/newsticker/liveblog-ukraine-donnerstag-111.html#Gefangenenaustausch

- - -

2022-04-14   Pli kaj pli da mortigitaj civiluloj - Ghenevaj Interkonsentoj

La 4 Ghenevaj Interkonsentoj - tiun de 1949 subskribis ankau Rusio - diras kiaj homoj estas sub protekto dum milito; civiluloj kaj militkaptitoj. Lau tiu Rusio - rusaj soldatoj - faris tre multajn plurajn gravajn krimojn kontrau chi-tiuj interkonsentoj. Eblas konkludi ke ili sekvis gheneralan ordonon, krei teroron kontrau la civiluloj. Intertempe alvenis internacia teamo por monitori tiajn krimojn.

Evidente ankau kelkaj ukrainaj soldatoj faris krimojn kontrau kaptitaj rusaj soldatoj. Ili jam estas esplorataj de la ukraina armeo-instancoj.

En Esperanto, k.a.: https://eo.wikipedia.org/wiki/Konvencioj_de_%C4%9Cenevo

https://ihl-databases.icrc.org/applic/ihl/ihl.nsf/vwTreatiesByDate.xsp

Rusio estis eligita el la UN-Konsilio pri Homaj Rajtoj, char la rusaj soldatoj faris multajn krimojn kontrau la Homaj Rajtoj.

(en pluraj lingvoj):
https://en.wikipedia.org/wiki/United_Nations_Human_Rights_Council#Russia

jen kunmetitaj informoj pri la milito de Rusio en Ukrainio.

(ligilo al pluraj lingvoj): https://de.wikipedia.org/wiki/Russischer_%C3%9Cberfall_auf_die_Ukraine_2022

En Esperanto, sed malpli aktuale:
https://eo.wikipedia.org/wiki/Invado_de_Rusio_en_Ukrainion_(2022)

- -

2022-04-08 OSKE postulas al Rusio haltigi la armean atakon

La Ministroj pri Eksterlandaj Aferoj de Pollando, Svedio, kaj Norda Macedonio, reprezentas la OSKE Triopon kunsidis kun Ukraina Ministro pri Eksterlandaj Aferoj Dmytro Kuleba en Rzeszow, Pollando. Dum tiu kunsido ili ripetis la alvokon al la Rusia Federacio deklari batalhalton kaj retiri ĝiajn fortojn el Ukrainio; kaj esprimis siajn plenajn subtenojn en ĉi tiuj malfacilaj tempoj.
La Ministroj mallaŭdis la raportojn kaj ŝokigaj atestoj pri kontraŭleĝa perforto kaj fi-trakto kontraŭ civiluloj en Bucha kaj aliaj urboj* en la regiono de Kyiv sekve de la retiro de Rusaj fortoj de ĉi tiuj lokoj. Ili ripetis sian alvokon por sendependa esploro.
La Ministroj ankaŭ esprimis siajn sincerajn bedaŭrojn ke neniu interkonsentiĝo estis atingita ampleksigi la mandaton de la OSKE Speciala Kontrolo-Misio en Ukrainio - pro la pozicio de la Rusia federacio.
(osce.org)

*) multaj civilaj mortigitaj en Bucha, Kramatorsk, Borodjanka, Tschernihiw, Mariampol, k.t.p.

= =

2022-04-07 Karaj geamikoj - aparte tiuj en Francio kaj Hungario,

Mi esperas ke **Yannick Jadot** ricevos bonan rezulton je la **10a de Aprilo.** Mi legis ke la Verduloj pli kaj pli montrighas kaj sukcesas ankau en la komunumoj - kio necesas por ke homoj povas konatighi kaj fidi ilin. Mi jhus rigardis dum 10 minutoj lian paroladon - kion mi trovis en la retejo de www.eelv.fr ; ( komprenis iomete, dank al franclingva subtitolo ) kaj povas diri ke li aspektis kaj simpatia kaj energia.

**En Hungario** jam okazis la parlamenta elekto. Fidesz, la partio de Orban, ricevis nur ch. 53% de la vochoj, sed povas ricevi 135 de 199 da seghoj. La koalicio de 6 partioj kun ilia chefa kandidato **Peter Marky-Zay**, inkluzive de LMP (la verda partio) ricevis 35% kaj ch. 56 seghoj - gratulon ! Malvenko, sed tamen multe pli bone ol je la antaua elekto kiam ili bojkotis ghin. Fakte estis tre diversaj kondichoj - char Orban kontrolis la amasmediojn, kaj antaue tranchis la elekto-regionojn tiel ke lia partio havu avantaghojn. (pli detalajn datojn mi ne trovis momente)

---

2022-04-06  Mariupol k.a. simila sorto kiel Lenigrado

La urbestro de Mariupol (antaue ch. 450.000 enloghantoj), bombumita, sieghita kaj okupita de Putin-a Rusio dum ch. 1 monato:  pli ol 5000 mortigitaj civiluloj. Kelkaj mil povis fughi individue, sed la rusa armeo blokis la organizitan elveturigon de maljunuloj k.a. kiuj ne povis fughi individue. La rusa armeo bruligis mortigitajn en mobilaj krematorioj por kashi la krimojn.

Ankau en aliaj urboj, Hharkiv ..., Rusio mortigis milojn da civiluloj.

Leningrado (antau la milito pli ol 3 milionoj), dum la 2a Mondmilito bombumita kaj sieghita de la Hitler-a Germanio dum 33 monatoj:  ch. 1.000.000 mortis pro bomboj au malsato, do 30.000 mortigitaj dum 1 monato. Do, ch. duobla monata kvanto kompare kun Mariupol. Eble 500.000 povis fughi trans la Ladoga-Lago, kiu ankau ebligis transporton de nutrajhoj dum la vintro.

Aliaj informoj:

Supozeble estis Rusio kiu metis naghantajn eksplodilojn (kontrau shipoj) el sovetia produktado en Bosporus - eble por preventi ke usonaj militshipoj povus subteni Ukrainion ? Rusaj militshipoj povas jheti automatajn armilojn ne nur al Odessa, kie trovighas la plej granda haveno de Ukrainio, sed ankau al pli foraj urboj (eble ghis Kievo ?).

Ukrainio grandkvante eksportis el la Asowa Maro kaj de Odessa grenojn, majzon kaj sunfloran oleon al Afriko (ekz-e Kenio) - sekve ankau tie grave altighas la prezoj por tiaj nutrajhoj.

(informfonto: wikipedia.org ; tagesschau24.de )

- -

2022-03-31  Nombrado de viktimoj

Jen tre detala informo pri viktimoj de la konflikto inter Rusio kaj Ukrainio ek de 2014. Ankau kun informoj pri la viktimoj de la nuna milito: civiluloj (ch. 7.000 ghis fino de Marto*), jhurnalistoj, soldatoj de ambau flankoj, nomoj kaj informoj pri ch. 18 rusaj oficiroj kiuj mortis. Kelkfoje oni donis tre diversajn nombrojn lau la fonto, surbaze de pli ol 100 fontoj - sen Brucha. (en diversaj lingvoj, sed ne en Esperanto):

https://de.wikipedia.org/wiki/Opfer_des_Russisch-Ukrainischen_Krieges

*) pluraj urboj estas okupitaj de rusaj soldatoj, tial ne eblas ricevi detalojn; miloj da homoj sidis/atendis dum longa tempo en keloj por atendi finon de bombado!

= =

2022-02-27  Publika letero de rusaj sciencistoj kontrau la milito de Rusio kontrau Ukrainio.

Pli ol 8.000 sciencistoj el Rusio, inkluzive de pli ol 60 membroj de Akademio de Sciencoj, subskribis publikan leteron en kiu ili protestas kontrau tiu milito de rusa armeo kontrau Ukrainio. Inter alie ili diras ke chi-tiu milito subfosas la bazon de la etablita sistemo de internacia sekureco. Rusio komencis chi-tiun militon sen ajna pravigo. Estas sole la respondeco de Rusio.

Jen la originala letero: https://t-invariant.org/2022/02/we-are-against-war/

Ghi estis detale menciita en la jhurnalo de la germanaj fiziko-sciencistoj (2022/4).

Komento de AVE/mw:

koran gratulon al tiuj bravuloj, en rusio ja povas esti danghere kritiki la registaron.

- -

2022-04-06 Rusio buchas kaj mensogas - neniu honoro restas je la rusa registaro.

La rusa armeo agadas ne pli bone ol la hitler-fashista armeo kaj Gestapo; kiu intence faris genocidojn. Fakte ankau la rusaj soldatoj estas viktimoj de ilia registaro, oni ne rakontis al ili la veran situacion; jam multaj mortis. Mi rememoras memorlokon en T'umen por tiuj rusaj soldatoj kiuj mortis en Afghanio - simila koshmaro.

Rusa armeo forlasis la urbon Bucha - nord-okcidenta antau-urbo de Kievo. Fotoj kaj raportoj de la tie restantaj homoj montras simple kruelan agadon de la rusa armeo. Oni kalkulis pli ol 400 civiluloj kiuj estis mortpafitaj - lau fotoj evidente kvazau kiel leporoj sur chasado (ne temis pri soldatoj, kaj lau mia scio ankau ne pri partizanoj). La ukraina ambasadoro diris ke virinoj estis perfortitaj, mortigitaj kaj rapide subterigitaj. Multaj jam trovighis en novan amaso-tombejon. Tiuj korpoj kaj aliaj restajhoj kiuj restis sur la tereno, restu ghis alvenas la esploristoj.

Rusio oficiale diras ke ili ne faris tion. Neniu kredas plu ion ajn al rusaj politikistoj au oficiroj. Bucha estas nura ekzemplo.

Bildoj pri Bucha trovighas en la novajhoj de internaciaj televidoj:

www.tagesschau.de/ , bbc.com ,

Multaj registaroj mendis kaj atendas oficialan esploron de neutrala teamo flanke de UN - por finfine akuzi la regantojn de Rusio pri krimoj kontrau Internacia Juro.

Ghis tiam restos sur la scenejo la korpoj, iliaj bicikloj au automobiloj en kiuj ili estis pafitaj kaj parte bruligitaj. Unu viro rakontis, ke ili sidis dum 2 semajnoj en la protekto-kelo, kiam oni diris ke la rusoj foriras, ili elvenis - kaj tuj kelkaj estis mortpafitaj. Ni vidis videon, ke homo vidante la rusan tankon, haltigis sian auton, komencis foriri, metis la manojn super la kapo - kaj estis mortpafita.

Komento de AVE/mw - el Germanio:

Ju pli montrighas la krimoj, des pli intense okcidentaj eksterlandoj pretas helpi al la ukraina prezidento kaj lia popolo, kiu defendas la okcidentajn valorojn de demokratio: honesteco, forto-divido, liberaj amas-medioj, liberaj civilaj asocioj. La politiko en Germanio sekvas chi-tiun direkton. Marie-Luise Beck, unu el la fondintoj de la Verda Partio jhus revenis de 4-taga vizito en Ukrainio (per trajno) kaj argumentis el tiuj spertoj - shi lernis el la masakroj kiuj okazis en Bosnio (1992), kiujn oni ne tuj haltigis; shi postulas pli intensan subtenon flanke de Germanio. Nia energio-politiko ja sekvas chi-tiun kurson, sed ankorau ne pretas tuj rezigni pri fosiliaj resursoj el Rusio, riskante ekonomian damaghon, kiu malfortigus nian helpivon.

Intertempe ankau Germanio pli rapide finas la importon de fosiliaj resursoj - komencas de karbo, nafto sekvos - sed la infrastrukturo por ter-gaso devigas ke ili ne tiom rapide povas/volas fini ankau tion. Intertempe pluraj politikistoj de la antaua registaro konfesis ke ili faris eraron, fidante al la ghenerala pacemo de Rusio - oni ja vidis tion ek de la rusaj militoj en Kaukazo.

= =

2022-04-03 Parlamentaj elektoj en Hungario kaj Serbio

hodiau estas **parlamentaj elektoj en Hungario kaj Serbio**. Feliche la opozicio en Hungario lernis ke ne taugas bojkoti elekton, sed ke kunlabori donas shancon. Chi-kaze estas unu opozicia bloko de maldekstra ghis dekstra flanko, ankau la verda partio Lehet Mas a Politika – Magyarország Zöld Pártja partoprenas. Ni esperas ke ili havos sufiche bonan rezulton por rompi la autokration de Orban, kiu kontrolas la amasmediojn kio chiokaze estas malbone por la tuta lando.

Jen ilia retejo en la hungara, plimulto el ni nur komprenos la temojn (kun trafaj bildoj) kaj vidi la kandidatojn ankau valoras: https://lmp.hu/orszagos-elnokseg/

inter ili pli konata Dr. Erzsebet Schmuck.

En Serbio estas simila bildo, simila autokrato kaj opozicio, kiu nun pli bone kunlaboras. La Europaj Verdaj Partioj vizitis pluraj grand-urbojn en Serbio en Februaro kaj diskutis kun opoziciaj partioj, inter ili Ekoloski Ustanak.

Jen ilia raporto en la angla: https://europeangreens.eu/events/serbian-green-recovery-tour

Mi deziras revenon al vere demokratia regado kun forta kaj bona opozicio.

- -

2022-04-3 Aktuale pri la rusa milito kontrau Ukrainio

Nun Putinuloj estas survoje al la sudo - bombadante ankau la belan metropolon Odessa - la unua inter la plej belaj urboj de Ukrainio lau mi sperto. Mi supozas ke lia nova celo estas atingi la Danubon (kiu estas la sud-okcidenta limo de Ukrainio al Romanio). Putin certe celas kontroli chiujn havenojn por ekonomie damaghi al la malamata najbaro. Kaj je la Danubo li certe shatus ankau kontroli la rivero-transporton al la EU-landoj. Mi esperas ke intertempe Ukrainio ricevas ankau la bezonatajn armilojn por "fermi la chielon" de kie hajlas la rusaj bomboj.

Mi deziras ke Rusio post la milito - ankau tiu iam finighos - devas pagi la reparatur-kostojn.

= =

2022-04-02 Koncizaj raportoj el Ukrainio

de jhurnalistoj - en la franca kaj en la germana, parte audeblaj la originala sono de personoj en la rusa au ukraina.

https://www.arte.tv/de/videos/RC-022260/ukraine-der-krieg-von-innen/

- -

2022-03-26 Dokumento 3 foje pri la aktuala milito de Putin:

Intervjuoj en Rusio pri la situacio - homoj pro kaj kontrau la prezidento;

Pri situacio en Sirio, kie rusaj bomboj kaj grapolbomboj terorigas la civilulojn.

Juda agentejo zorgas por judaj rifughantoj el Ukrianio.

(en la franca kaj la germana): https://www.arte.tv/de/videos/030273-853-A/arte-reportage/

= =

2022-03-26 PR Chinio subtenas la rusan prezidenton rilate la militon kontrau Ukrainio.

Ni komprenas ke la china najbaro Rusio estas grava - kaj chiukaze subtenenda. Ili dependas de fosiliaj fueloj el Siberio same kiel EU. ...

2004-07 UK en Pekino - diversaj kulturoj

Responde al AVENO - pri Homaj Rajtoj en P.R. Chinio - de 2022-02-09 venis rakonto de Mirejo pri sperto labori kun ĉinoj.

Pekino,Ĉinio, Universala Kongreso 2004

Mi respondecas pri Internacia Arta Vespero, tio estas arta evento en la lasta vespero de la Kongreso, do vendrede vespere. Iuj kongresanoj anoncas sin por kanti, danci, deklami… Mi devas elekti, kiu montros sin sursceneje, kiu aktoros. Okazis sinprezentoj (angle: « casting » ).
Ĉiutage dum la semajno estas iu momento en la programo, kiam mi akceptas la sinproponantajn artistojn. Mi rigardas kaj aŭskultas ilin en sia prezento. Kaze de bezono mi konsilas aŭ helpas. Ni devas esplori pri la bezonataj muzikoj, muzikinstrumentoj k.s.
Ĵaŭde matene okazas tia momento. Venas 8jara ĉina infano kun ĉinstila violono. Mi aŭskultas lin. Li ludas tre tre rapide, sed la notoj ne ĝustas. Bedaŭrinde… Poste mi renkontas lian patron en koridoro. Ni paŝas kune. Mi diras al la patro, ke ĵaude vespere okazos vespero por junuloj, tie ludos

lia filo. Ne en Internacia Arta Vespero (IAV). La patro furioziĝas kaj puŝas min ĉekorpe kiel hoke-sketisto. Feliĉe mi sukcesas ne fali. Li diras : « Mi estas prezidanto de …. kaj prezidanto de …. Vi DEVAS preni mian filon en IAV ! » Mi rifuzas, ĉar tiaj metodoj ne impresas min. Li koleras, supozeble ĉar li kutimas havi sukceson per tiaj manieroj.
Vendrede matene okazas la lasta momento por sinproponi. Kantas esperantistino el Belgio faman kanzonon de Edith Piaf : « Allez venez, Milord ! ». En malplena salono mi aŭskultas ŝin, scias, ke ŝi belege kantas ĉar mi bone konas ŝin, kaj pro la ritmo mi komencas turni min mem sola en la libera spaco inter la scenejo kaj la malplenaj seĝovicoj. Tuj aperas kvar viroj kaj ili ĉirkaŭas min kiel policistoj : « Ĉi tie oni ne rajtas danci ! ». Do mi devas stari senmove, triste…
Sekvas grupo el tibetaj studentoj, kiuj restadas en Pekino kaj lernas Esperanton. Akompanas la skipon ilia Eo-instruisto, granda pala viro. Mi demandas al li : « Ĉu vi estas tibetano ? » Li respondas : « Ne. Mi estas de la etno han. » La tibetaj junuloj, ĉiuj ne altaj kaj malhelhaŭtaj, iras al la scenejo kaj dancas en koloraj kostumoj. Belega danco ! La instruisto turnas sin al mi kaj anoncas : « Ili ankoraŭ havas kanton, ili volas ankaŭ kanti. » Jen mia respondo : « Mia programo jam plenas. Pro tio mi volonte aŭskultos nun la kanton sed poste mi devos elekti, ĉu ili dancu aŭ kantu dum IAV vespere. » Fine de la danco ĉiuj junuloj venas al la rando de la scenejo kaj staras kiel soldatoj en vico. Ili kantas. Supozeble en la ĉina lingvo. Mi demandas al la instruisto : « Kion signifas tiu kanto ? » Li respondas : « Ni estas feliĉaj kaj fieraj esti ĉinoj ! ». Mi komentas : « Por IAV mi elektas la dancon ! »
En ĉiu kontakto kun ĉinoj estas ia politika aspekto…
En Svedio en 2003 (Gotenburgo) mi havis altnivelajn teknikistojn, kiuj organizis diversajn lumetosojn dum la vespero. Mi povis paroli angle kun ili. En Pekino mi havis interpretiston, kiu tradukis el la ĉina al Esperanto kaj inverse. La teknikistoj metis kompletan lumon sur la tuta scenejo kaj supozeble iris amuziĝi dum la du horoj de la evento. (de Mireille Grosjean)

= =

2022-03-18 Komentoj pri la milito de Rusio kontrau Ukrainio:

Ukrainio decidis resti sendependa. Tial ili sin-defendas - jam multe pli longe ol Putin opiniis - kontrau la rusa invado, bombado ankau de civilaj konstruajhoj, kiu komencis je la 25a de Februaro 2022: grandaj loghdomoj, malsanulejoj, infrastrukturo. Fakte tia milito estas militkrimo, kaj logike la prezidento de Rusio estas militkrimulo. Pri kiu decidas la Internacia Pun-Kortumo kaj la Internacia Kortumo, ambau en Den Haag.

Okcidentaj landoj subtenas Ukrainion defendi sin - sendas armilojn (parte kiel donaco) sed ne rekte partoprenas. Jam mortis multaj homoj, rusaj kaj ukrainaj, civiluloj, infanoj, soldatoj - certe ankau bestoj. Pluraj milionoj - chefe maljunuloj, patrinoj kun junaj infanoj - fughis, char iliaj loghejoj estis detruitaj, au char ili timas ke ili estos detruitaj.

Tutmonde okazas solidarecaj manifestacioj favore al Ukrainio. Ech en la rusa TV okazis protestoj kontrau tiu milito, pri kiu la registaro propagandas false, kaj malpermesas en Rusio nomi tiun okazajhon "milito". En Bad Godesberg, apud Bonn, Germanio, la Verda Partio organizas dum du tagoj semajne trankvilajn manifestaciojn ("Stille Mahnwachen") antau la Ghenerala konsulejo de Rusio, kie mi partoprenis/-as/-os. Interesa detalo: sur la poshtkesto de tiu grandega beton-komplekso estas skribita "Botschaft der UdSSR" ??? Kelkfoje eblis paroli kun klientoj de la konsulejo. Kelkaj homoj evidente plene kredas la falsajn informojn de la rusia prezidento, plej grave ke Ukrainio faras genocidon kontrau rusoj, diras ke la atakoj kiujn faradas la rusa armeo estas faritaj de la ukraina armeo.

Evidente la Rusa Ortodoksa Eklezio (patriarko Kyrill) subtenas tiun militon; aliflanke pastroj de la sama eklezio estas kontrau chi-tiu milito. Evidente al Kyrill malplachas ke la Ukraina Ortodoksa Eklezio estas sendependa "autokephalos".

Mi tamen esperas ke tiu kruelajho baldau finighas, ke Ukrainio restas sendependa, ke ni povas helpi la rekonstruadon, ke Rusio pagos por la detruado. Ke restos paco ene de Europo. Kaj finfine, ke ni iam iam denove shatos viziti Rusion. de manfred westermayer (sekretario de AVE)

2022-03-18  OSKE kondemnas la daurantan perforton de rusaj armeo kontrau civilaj areoj en tuta Ukrainio.

Aparte mencias la bombado kaj plena detruo de la teatro en Mariupol, sub kiu trovighas rifughejo - tie estis pluraj cent homoj; pli ol cent estas savitaj - aliaj atendas. La sav-laboroj okazas sub malfacilaj kondichoj.

- -

2022-03-08  Geopolitikaj mapoj pri Rusio kaj pri la milito al Ukrainio:

Arte.tv, la franca-germana TV-kunlaborado, montras chiun Sabaton aktualajhojn.

2022-03-03  (en la franca kaj germana, 26 min):

Putin, la Ukraino kaj pli poste:

https://www.arte.tv/fr/videos/108166-001-A/le-dessous-des-cartes/

kaj

2021-10-07 (en pluraj lingvoj , subtitolita i.a. en la polan, 13 min):

Pri la diversaj viv-situoj en Rusio, industrio, administracio, ...:

https://www.arte.tv/de/videos/103960-007-A/mit-offenen-karten/

= =

2022-03-05  lau-legha vortumo nun pli gravas

La Putina parlamento akceptis akrigitan leghon por amas-medioj*:

- informi pri la okazajhoj de rusa armeo en Ukrainio estas malpermesita
- oni malpermesis uzi la vortojn „milito“ kaj „invado“ sed nur eblas „speciala operacio“ !

Mi ne scias chu oni rajtas uzi la vorton „defendo“ - flanke de la najbaro.

*) Mi supozas ke plejmulto de la parlamento akceptis, char temas pri legho. Se estis tiel, mi pridubas la mensan staton de chi-tiuj akceptintoj.

Plejmulto de amasmedioj (eksterlandaj kaj la malmultaj enlandaj) nun laboras el eksterlando.

Unu el la fontoj restis ruslingva vikipedio ... sed ne scias chu legeblas en Rusio ?

**Komento de AVE/mw:** en 2000 mi vizitis T'umen, kaj tie Irina montris al mi la monumenton por la mortintaj soldatoj de la „speciala operacio“ en Afghanio. Ankau nun kelkaj revenas al sia hejmlando en „speciala kesto“.

Se oni diskutas pri literaturo - ekz-e de Leo Tolstoj „Speciala Operacio kaj Paco“, kiun mi iam legis , sed sukcesis legi nur la duonon - mi supozas ke oni devas recikligi chiujn librojn kiuj enhavas chi-tiujn diabolajn vortojn, kaj devas eldoni ilin denove kun la necesaj korektoj ? Mi legis multajn librojn de rusaj verkistoj - kutime en la germana traduko. Nuntempe la nuna situacio rememorigas min al „La Majstro kaj Margarita „ (senproblema amrakonto - chu ne ? ;) , kaj en Esperanto „Ovoj de Rampuloj“ ambau de M. Bulgakov (estis bela ekspozicio pri li antau 4 au 3 jaroj en la universitata biblioteko en Freiburg) ...

Mi esperas ke la vivo en Rusio ighis pli facile ? Eble niaj samideanoj tie povus iomete komenti.  Venontjare mi volas vojaghi al la kongreso de Tutmondaj Verduloj en Seulo, kaj rememoras ke Tatjana bone organizis trajnan karavanon por la lasta UK tie.

Demando: kiel vojaghi de Vladivostok al Seulo ? Chu eblas trans Norda Koreio ?

Bondezirojn, amike, manfred

- - -

2022-03-02  UN postulas finon de milito en Ukrainio

Nur 4 reghimoj subtenis Rusion: Belarus, Norda Koreio, Syrio kaj Eritrea - Putin estas en malbona socio !

35 sin-detenis, 141 kondamnis la militon de Rusio ( de ilia prezidento Vlad Putin*) kontrau Ukrainio, kaj postulis retiri la armeon el tiu sendependa lando. Ne necesas rakonti ke Rusio en la Sekureco-Konsilio de UN vetois pri la sama deklaro - chi-tiu Veto-regulo ege reduktas la povon de tiu konsilio.

Rusaj rakedoj kaj stiritaj rakedoj al diversaj urboj kaj eksplodoj en Ukrainio detruis i.a. plurajn loghdomojn, mortis kelkaj 100 civilaj personoj, kaj ankau soldatoj de ambau flankoj. Tiaj nombroj nun ne estas tre klaraj.

*) Pri lia antaunomo: „Vlad“ - mi rezignas pri la „i-mir“ - char „mir“ en la rusa signifas kaj mondon kaj pacon. Vlad ankau rememoras al „Dracula“. Putin ne estas pacema, kaj tia homo ne indas regi la mondon.

Feliche EU bone kunlaboras, ankau facvore al la rifughintoj - chefe virinoj kaj infanoj - ricevas helpon de multaj civitanoj de la najbaraj landoj (Pollando), kaj EU decidis doni al ili (momente) 3-jaran restadon.

Finfine la internacia kunlaboro decidis diversajn - chefe financajn - sankciojn kontrau rusaj bankoj kaj kelkaj homoj, kiuj reduktos la povon de Rusio. Bedaurinde la rusa popolo devos porti la sekvantajn problemojn. Jes, ankau la germana (k.a.), char la decido redukti la dependecon de fosiliaj fueloj el Rusio, kauzos apartajn kostojn . Ne uzi la novan duan gas-dukton trans la Balta Maro apartenas al tiuj decidoj.

Komento de AVE/mw: Nia celo estas: **montri al Putin ke estas pli bone lasi la libereceman Ukrainion,** kaj reiri al paca kunekzistado. Restas multe da laboro por ripari kaj rekonstrui la grandajn damaghojn (domoj, infrastrukturo, subteni la familiojn de la mortintoj kaj vunditaj) - reparaciojn kiujn devas pagi Rusio - unua-range Putin kaj lia subtenanto Lawrow, ktp. . Poste oni povas diskuti pri Krimeo kaj aliaj problemoj.

Se iu volas vidi dokumentajn filmojn: francetvinfo.fr, arte.tv, phoenix.de, novayagazeta.ru, bbc.com, ktp.

= =

2022-02-27  AVE - Deklaracio de UEA pri la atako de Rusio kontrau Ukrainio - rolo de lingva neglekto

Karaj geamikoj,

pri la aktuala agreso kaj invado de Rusio en Ukrainio mi forgesis skribi, kiom mi admiras la homojn en Rusio kiuj protestas kontrau tiu kontrau-popol-legha politiko de sia registaro.

Hodiau (Dimancho 2022-02-27) okazis grandegaj manifestacioj en multaj grandaj urbo de la tuta mondo, ekzemple en Berlino - miloj da homoj marshis laulonge de la Ambasadejo de Rusio. Posttagmeze ni audis tre klaran  kaj koncizan prelegon de Kalle Kniivilä (verkisto de pluraj libroj en Esperanto pri Rusio de prezidento Putin, vidu ankau en "esperanto" 2022/2) - organizita  de Andy Blair en Kanado - pri la fono de tiu agreso, kaj la falsaj riprochoj flanke de la rusa prezidento Vlad Putin.

Hierau - finfine, char evidente la rusa registaro ne pretis vere diskuti por komune trovi solvon - la germana registaro shanghis la politikon kaj decidis sendi defendajn armilojn al Ukrainio kaj daurigi la subtenon. Kaj preskau mirakle: chiuj EU-shtatoj akceptis la komunan subtenon por milit-rifughintoj el Ukrainio.

Nia neutrala UEA hodiau deklaris - char por ni la lingvaj rajtoj gravas, kiujn Ukrainio bedaurinde ne sufiche respektis kontrau la granda minoritato de ruslingvaj civitanoj - la

jenan longan deklaracion:

https://uea.org/gk/1023

"Reage al la militaj tondroj kaj homa sufero en la oriento de Eŭropo UEA deklaras:"

inkluzive de la jena postulo

"Ni insistu, ke la membroj de Unuiĝintaj Nacioj devigu respekton al tiu Deklaracio [de la Homaj Rajtoj - chikaze pri lingvoj], al la Ĉarto de UN kaj al ĝiaj fondaj principoj, kiuj naskiĝis de la deziro, ke neniam ripetiĝu la hororoj de amasmilitado."

Mi komprenas ke UEA pro sia neutraleco ne emas fingromontri al la agresinto, prezidento Putin; komprenas ke ankau je la flanko de Ukrainio estas kulpo: neglekti la lingvajn rajtojn de ruslingvanoj. Tamen tio ne rajtigas al invado, detruado kaj mortigo, sed al kunsidado je Ronda Tablo - ekzemple organizita de OSKE.

Mi esperas ke tiu deklaracio estas legata kaj komprenata ankau ambauflanke de tiu milito. Ni chiam esperas ke eblas fini la militon kaj reiri al diskutado.

Bondezirojn, samideane, Manfred

= =

Saluton Esperantistoj,

Mi invitas vin al dimanĉa evento, pri la temo de **Rusio kaj Ukrainio**.

Parolos la ĵurnalisto **Kalle Kniivilä**, aŭtoro de la esperantlingvaj libroj *Homoj de Putin*, *Krimeo estas nia*, *La Malamiko de Putin*, kaj aliaj libroj pri geopolitiko kaj kulturo en Rusio kaj Orienta Eŭropo. Poste ni ĝentile kaj trankvile diskutos la situatio, kiu rapide ŝanĝiĝas.

La diskuto okazos dimanĉa la 27-a de februaro, je la sekvaj ligilo kaj horoj:

**Rusio & Ukrainio: Interesoj kaj motivoj**
Britio kaj Portugalio (GMT): **15a** horo
Mezeŭropo (CET): **16a** horo
Orienta Eŭropo (EET): **17a** horo
Rusio (MET): **18a** horo
Per Zoom: https://smu-ca.zoom.us/j/98568618976
La evento-afiŝo (PDF) estas alfiksita - bv. sendu ĝin al homoj, kiuj eble interesiĝas.
Dankon, Andy Blair

- -

2022-02-26  Evoluo de la rusa prezidento

Ruediger von Fritsch estis ambasadoro de Germanio en Rusio dum la jaroj 2014 - 2019. En duon-hora intervjuo temis pri la riprochoj kiujn Putin jhetas kontrau la okcidento. Li klare refutas ilin. La historiajn eldirojn de la iama prezidento M. Gorbachev, kiu rimarkis tia SU ne plu bone funkcias. Ek de 1994 oni diskutis, kaj 1997 komune konsentis pri „Baza Akto/Dokumento NATO-Rusio“ kiu klare estas reciproka garantio de limoj kaj sendependeco de chiuj shtatoj. Pri la ekzisto de NATO-soldatoj en la iamaj shtatoj de SU, oni interkonsentis ke tie NATO rezignas kontinue setligi batalpovajn trupojn. Pro tio oni sendis nur malmultajn kaj la unuopajn soldatojn nur por limigita tempo ekzemple en la baltiajn shtatojn. El tiu interkonsento sekvis la „Konsilio inter NATO kaj Rusio“. Pro la Majdan-Revolucio en Ukrainio 2014 kaj la venenigo de Skripal okazis interrompo de la regulaj renkontighoj.

Von Fritsch bedauris ke sub Putin Rusio ne plu emis kunlabori ene de la „komuna domo Europo“, kion li ja mem proklamis dum sia parolado - en la germana lingvo - antau la

germana parlamento (2001-09-25, youtube.com/watch?v=F0_0WqUuh9E ), sed pli kaj pli retirighis kaj timis la demokratiajn liberecojn; tial malfaciligis kaj ech malpermesis la laboron de multaj NRO-oj.

https://www.phoenix.de/sendungen/gespraeche/phoenix-persoenlich/ruediger-von-fritsch-zu-gast-bei-michael-krons-a-2522223.html

(pri la Baza Akto ankau en la rusa kaj ukraina): https://de.wikipedia.org/wiki/NATO-Russland-Grundakte

Komento: nuntempo estas escepto pri la temo „ne-daura setlado de soldatoj“ , char Rusio delonge kaj komplete neglektas chi-tiun interkonsenton. Pro tio kelkaj sendependaj shtatoj preferas esti membro en NATO.

---

2022-02-24 Okupaciado de Rusio je Kartvelio

Post Abhhazio sekvis 2008 Suda Osetio kio dank' al rusa agitado estis forprenita de la teritorio de Kartvelio.

Lokaj kartveloj observas la pikdratan limon, char rusaj limgardistoj daure klopodas shovi la limon en la montara tereno. Unuflanke estas problemo de la pashtistoj, char iliaj vilaghaj gregoj iras lau la nutrado au akvo en rojoj. Sed jam plurfoje au bovinoj estis akaparitaj au pashtistoj estis malliberigitaj por pagi punmonon post kelkaj tagoj. La limo estis observata de neutralaj Europaj monitoruloj, sed ili ne rajtas eniri en la terenon de la alia flanko. La lokanoj lamentas ke Europo ne sufiche intense defendas la konsentitan limon - kaj ankau tiras komparon kun la tro malforta kaj malrapida reago de Europo kontrau al maljusta milito de Rusio kontrau Ukrainio.

La filmo dauras 33 minutoj, kaj videblas ghis la 22a de Augusto.

https://www.arte.tv/fr/videos/099759-015-A/arte-regards-les-georgiens-dans-le-piege-de-l-occupation-russe/

https://www.arte.tv/de/videos/099759-015-A/re-patrouille-am-stacheldraht/

Chi-foje la dokumenta filmeto estis subtitolita por tiuj lingvoj: en, es, it, pl

https://www.arte.tv/en/videos/099759-015-A/re-georgians-against-russian-occupation/

https://www.arte.tv/es/videos/099759-015-A/arte-regards/

https://www.arte.tv/it/videos/099759-015-A/arte-reportage/

https://www.arte.tv/pl/videos/099759-015-A/arte-regards/

= =

2022-02-08 en XinJiang / orienta Turkestan minacas ne nur kultura genocido

En P.R.Chinio ekzistas 56 etnaj minoritatoj.

Lau la konstitucio de P.R. Chinio la lando konsistas el pluraj popoloj. Sed nun la registaro volas neniigi la popolon de ujguroj. Nur en la 18a jarcento Chinio sukcesis konkeri Orientan Turkestanon, kaj nomis ghin XinJiang, Okcidenta Lando (au Imperio ?).

Post la disfalo de la Qing-Dinastio ujguroj denove estis en libera Respubliko Orienta Turkestano. Sed post la venko de Mao Dse Dong, tiu konvinkis ilin, subtenita de Stalin, 1949 kunlabori - kaj invitis ilin en Augusto al „konsultativa Konferenco“ en Pekino. La gvidantoj de R.O.T. ekflugis, sed ne plu aperis. Nur en Decembro Chinio klarigis ke la aviadilo krashis proksime de Bajkalo. Sen gvidantoj de R.O.T. Mao povis transpreni la

landon - garantiis ilian kulturan identecon. 1955 ighis „Autonoma Regiono XinJiang“. La ujgura lingvo restis permesata. Sed tiam komencis la setlado de han-chinoj, kaj ili havigis al si la plej bonajn grundojn. Kaj la chefo de la regiona administracio chiam estis han-ulo.

Post la morto de Mao venis Deng Xiao Ping, kiu intencis doni pli la autonomio al la minoritatoj - une el tiuj politikistoj estis la patro de nuna prezidento Xi.

Post la disfalo de Sovetunio, 1991, la KPCh intencis bari similan situacion en Chinio. Oni malpermesis religiajn kunvenojn, koran-lernejoj estis fermitaj; miloj da ujguroj estis malliberigitaj, t.n. radikaluloj estis kondamnitaj kaj publike mortigitaj. Post la atako en Septembro 2001 la cina registaro troe opiniis ke ekzistas islama shtato ankau en XinJiang - tio estas dubinda. Usono akceptis tion, char bezonis konsenton de Chinio por sia atako kontrau Irako. Xi organizis la Olimpikajn Ludojn 2008 en Pekino. 2004 okazis la UK en Pekino. Je la 5a de Julio 2009 okazis manifestacioj en XinJiang, char 2 ujguraj laboristoj en suda Chinio estis linchitaj de hanuloj. La polico distribuis la manifestaciantojn, kaj mortpafis kelkajn - sekve okazis perfortaj bataloj inter hanuloj kaj ujguroj, tiam mortis pluraj cent homoj. La registaro ne interesighis pri la kauzo de tia malamo; sed trovis argumenton kriminaligi chiujn ujgurojn. Multaj el ili fughas en najbarajn landojn - kelkaj alighas al IS en Sirio. Xi decidis al deviga asimilado de ujguroj al bonaj chinoj ... (vidu mem la lastaj 12 minutojn de tiu filmo - i.a. montras ujguron kiu  postulas raporti pri la ekzisto au perdo de liaj familianoj; lia patro estis torturita kaj mortigita char la filo protestis publike en eksterlando. La china registaro montras fashisman vizaghon. Fughintoj akuzas Xi je la Internacia Jughkortumo en Den Haag. En autuno 2020 estis 39 landoj kiuj postulis publikan esploron de la situacio en XinJiang, al tio kontrauis 45 landoj kiuj kunlaboras kun Chinio. 2021 Usono, Kanado, EU kaj GB aktivis sankciojn kontrau 4 chefaj respondeculoj char ili respondecis pri tiuj gravaj pekoj kontrau la Homaj Rajtoj. Pluraj shtatestroj ne partoprenis la Vintrajn Olimpikojn de 2022.

Returne al la okazajhoj en XinJiang:

Pro tio prezidento Xi setligas la nacian han-etnon ankau en  tiu t.n. Autonoma Provinco. Pro la fakta okupacio de tiu granda regiono okazas pli kaj pli da manifestacioj, kaj ankau perfortaj atencoj.

Pro tio ek de 2014 Xi instalis perfortan politikon: represion, torturon, cerbo-lavado,  seksaj perfortoj pere de gardistoj, genocidon kaj grandskalan malliberigon de ujguroj en t.n. gigantaj gulagoj (pli ol 380) por „re-eduki la ujgurojn“; char oni ne rajtas viziti la regionon la nombro estas ne-certa: povas esti miliono da malliberigitaj ujguroj. Vivi sian islaman religion estas kauzo por esti malliberigata. Raportas homoj kiuj sukcesis elvojaghi kaj peti azilon en okcidentaj landoj.

Ekzistas dokumentoj de Xi kaj KPCh kie li ordonis KZ-gulagoj kaj komparis la religion „religian ekstremismon“ kun viruso au drogo. Kaj necesis apliki chiujn rimedojn de diktaturo por venki; ne montri „Gnade“.

Kaj kompletan monitoradon per chiaj teknikoj.

Estas listo de 75 - merkmale - inkluzive respekti la regulojn de Ramadano; lau kiuj homo povas esti estimata (?). Han-vizitantoj estas sendataj en ujguran familion por spioni ilian rilaton kontra la KPCh - fakte temas pri falsaj amikoj. Celo estas ekstermi la kulturon - kultura genocido kontrau 12 milionoj da ujguroj.

La chefaj kontrauuloj estas intelektuloj, profesoroj, poetoj kaj muzikistoj. Ilham Tohti, ekonomio-profesoro kiu postulis la egalrajtecon por ujguroj kaj hanoj; pro tio li estis kondamnita pro „Separatismo“ al vivo-longa malliberejo. La Europa Parlamento 2019 dedichis al li la „Sahharov-Premion pri Spirita Libereco“.

Lernolibroj kaj instru-planoj por bazaj kaj mezaj lernejoj estis tra-kribritaj por trovi „erarojn“ - bildoj el antikva Orienta Turkestano estas traktitaj kiel „diabola, subversiva“.

La registaro eliminis tombejojn, sanktejojn kaj moskeojn (detektebla de satelitaj fotoj). La ostoj estis deponitaj en novaj tomboj kiuj nur montras numerojn. La verkistoj de tiuj lernolibroj (de 2003 kaj 2009) estis forte punitaj. Sattar Sawut, direktoro de la edukado en XinJiang estis kondamnita al morto; kaj vivlongan malliberejon por liaj 3 vic-direktoroj. Inter ili Yalqun Rozi, kiu rezistis koncedi ke ili faris komploton - ne estas klare chu li ankorau vivas.

Paroli ujguran lingvon estas malpermesata. Infanoj de malliberuloj estas en gulagoj kie ili devas forgesi sian devenon.

En la suda parto de XinJiang esploristo trovis dokumentojn pri la ordono kiom da ujguraj virinoj estos sterlizotaj - chirkau 30%; char tie la han-etno ankorau estas minoritato. Pli ol unu infano estas malpermesita al ujgura familio - sed ne plu al hana familio. Oni delogas junajn virinojn al orienta Chinio, por labori tie - kun la ideo ke ili tie edzinighos al hanulo. La junulinoj ne shatas, sed ili devas, char „malakcepti laboron“ (ie ajn) apartenas al tiu listo de 75-radikalismoj. Oni kalkulis ke tiel 80.000 da junaj ujguroj estis for-setlitaj. Ankau fabrikoj de okcidentaj konzernoj profitas de tiu deviga trans-setligado kaj de trud-laboristoj en XinJiang.

En XinJiang ankau  germanaj firmaoj profitas de la gulagoj en XinJiang uzante tiajn trud-laboristojn.

https://www.arte.tv/fr/videos/100174-000-A/chine-le-drame-ouighour/

https://www.arte.tv/de/videos/100174-000-A/china-das-drama-der-uiguren/

Komento AVE/mw:  Mi estis en Urumqi post la UK en 2004, ne rimarkis grandajn problemojn inter hanoj kaj ujguroj. Konfuceo lau mi sekvis justan politikon. Eble Xi forgesis tion ? Se iu trovas la kolekton: „Analektoj de Konfuceo“ certe trovos liajn pli saghajn eldirojn.

= =

2020-0-25  Holokausto / Shoah - dokumentaj filmoj che Arte.tv

Tiuj filmoj estas elekteblaj en franca kaj germana kaj angla;

tiu ghenerale pri antisemitismo ne en la angla.

Rememori kaj scii espereble helpos ke tia tutmonda katastrofo neniam plu okazos.

https://www.arte.tv/fr/videos/098107-000-A/la-propagande-antisemite/

https://www.arte.tv/fr/videos/095173-000-A/les-marches-de-la-mort/

https://www.arte.tv/fr/videos/093661-000-A/les-resistants-de-mauthausen/

https://www.arte.tv/de/videos/098107-000-A/jud-suess-2-0/

https://www.arte.tv/de/videos/095173-000-A/vernichtung-im-laufschritt-todesmaersche-1944-45/

https://www.arte.tv/de/videos/093661-000-A/kz-mauthausen-von-fotografen-haeftlingen-henkern/

kaj pluraj dokumentoj pri la antisemitismo de nazia Germanio.

https://www.arte.tv/de/videos/RC-020104/holocaust-gedenktag/

- -

2022-01-26  Triflanka kontakt-grupo de OSKE renkontighis:

Raporto pri aktualajhoj en Luhansk kaj Doneck - kiom da armitaj „renkontighoj“ (malgrau la armistico), riparoj de civila infrastrukturo, ktp.

Lingvoj: en, ru, ua; https://www.osce.org/special-monitoring-mission-to-ukraine/510830

- -

2022-01  Rusio kaj najbaroj kaj NATO por paca kunekzistado

al mia lasta mesagho venis kaj kelkaj aproboj kaj kritikaj komentoj.

Pri la rusaj minoritatoj: SU intence en-plantis etnajn rusojn en la konkeritajn (al-igitajn) shtatojn; en Estonio kaj Latvio ili devus havi minoritatan rajton pri la rusa lingvo; de Latvio dum multaj jaroj sidas Tatjana Shdanoka en la frakcio de Verdaj Partioj, kiu defendas ilin en la EP.

Pri agresemo de Okcidento kaj de Rusio: „fakte Ruslando neniam atakis okcidenteŭropon“

Fakte SU, en kiu Rusio havis la gvidan rolon lau la Hitler-Stalin-Kontrakto, tuj post la agreso de Nazi-Germanio al Pollando (1939-09-01), aneksis orientan Pollandon, a baltiajn shtatojn kaj Finnlandon. Oni povas diskuti chu tiuj apartenas al "okcidenta" Europo - mi supozas ke jes - se oni difinas „Okcidenton“ kiel malferma socio kun separitaj sendependaj potencoj (legislativo, ekzekutivo, leghdono - kaj ankau jhurnalismo kaj sendependaj civitanoa organizoj. Finnlandigho signifas (lau vikipedio):  „  ke pli potenca ŝtato influas aferojn en malpli potenca najbara ŝtato“. Tion nuntempe faras Rusio en Donbas kaj Luhansk - kaj jam aneksis Krimeon.

Pri la temo garantio kaj paca kunekzistado:

Chiukaze ekzistas skribita Memorandum de Budapesto, 1994, kiu "garantias" la limojn; kiujn Putin delonge tushas (Kartvelio, Donbass, Krimeo).

Jen la diversaj dokumentoj - kunvenoj (angla versio, simple elektu pagharon en via lingvo):

https://en.wikipedia.org/wiki/Budapest_Memorandum_on_Security_Assurances

https://en.wikipedia.org/wiki/Sinatra_Doctrine

https://en.wikipedia.org/wiki/Malta_Summit

Chu NATO „ante portas“ minacas Rusion ?

mi dirus: ne, char neniu  flanke de nunaj kaj eble estontaj NATO-shtatoj havas ideologion* konkeri rusian terenon.
Fakte la novaj super-rapidaj rakedoj de Rusio (kiuj supozeble trovighas en la regiono de Kaliningrado ?)  povas atingi same rapide plurajn grandajn chefurbojn de NATO-shtatoj (Varsovio, Vieno, Berlino, Bruselo, Londono, Parizo, Kopenhago ktp.), kiel tiuj rakedoj de NATO povus atingi Moskvon, ktp.. Estus homar-minaca frenezajho komenci tian nuklean militon.

*) Jes, ideologoj kiel Napoleon kaj Hitler (kaj kunuloj) havis tian ideologion. NATO de si mem ne estas agresema; do, la aliaj NATO-shtatoj haltigus tiajn ideojn.

Mi esperas ke eblas kunsidi je Ronda Tablo organizita de OSKE kaj trovi denove pacan kunekzistadon inter Rusio kun siaj najbaroj kaj pli okcidentaj kvazau-najbaroj. Ekonomia kunlaboro estas delonge bazo de paco.

**- - fino**